

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

La Tria Tutmonda
Ekzamentago

Partioj kaj lingvaj rajtoj

Konatigu kun “Ŝanĝo”

Dennis Keefe:
La subfakoj de
merkato aplikataj al la
Esperanto-movadoj (3)

Sergio Pokrovskij:
Okazo kaj kazo (3)

Vilmos Benczik:
Eldonado sen mitoj

Rusa Antologio:
Apollon Majkov

Nia trezoro:
Zenon Klemensiewicz



2014

7

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2014. №7 (237)

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Mojajev, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki, Marian Zdankowski

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Retejoj <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru/>

Abontarifo por 2014

Internacia tarifo: 42 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 22 eŭroj

Ruslanda tarifo: 690 rubloj

Pollanda tarifo: 69 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 500 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (4000 rubloj).

Duona paĝo: 60 EUR (2400 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1400 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (800 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas double. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2014.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2014, №7 (237).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 16 июня 2014 г.

Цена свободная. Тираж: 500 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Sur la kovropaĝo de la julia *Ondo* estas la pentraĵo *Foliarbaro* (1897) de la rusa pentristo Ivan Ivanoviĉ Ŝiŝkin (1832-1898). En la nuna sezono oni povas vidi tiajn pejzaĝojn ne nur sur bildoj, sed ankaŭ en la arbaroj de Ruslando. Venu, ekzemple, al SES apud Moskvo kaj vidu!

Julio 2014

1. Antaŭ 400 jaroj mortis Isaac de Casaubon (Casaubonus, 1559-1614), la plej klera homo en la tiutempa Eŭropo. Antaŭ 175 jaroj mortis la Otomana sultano Mahmud II (1785-1839).

2. Antaŭ 50 jaroj (1964) prezidento Lyndon Johnson subskribis leĝan akton, kiu malpermesis segregacion en Usono. Antaŭ 300 jaroj naskiĝis Christoph von Gluck (1714-87), germana-aŭstria komponisto. Antaŭ 25 jaroj mortis Andrej Gromyko (1909-89), ministro de eksteraj aferoj de USSR (1957-85), prezidanto de la prezidantaro de la Supera Soveto de USSR (1985-88).

3. Antaŭ 1050 jaroj (964) la armeo de la Rusa Regno sub la gvido de la novgoroda kaj kieva princo Svjatoslav venkis la armeon de Ĥazarujo.

5. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis Jean Cocteau (1889-1963), franca verkisto, pentristo kaj reĝisoro.

6. Antaŭ 25 jaroj mortis János Kádár (Csermanek, 1912-89), ĝenerala sekretario de Hungara socialista laborista partio (1956-88).

8. Antaŭ 125 jaroj (1889) aperis la unua numero de la usona ĵurnalo *The Wall Street Journal*. Antaŭ 175 jaroj naskiĝis John Davison Rockefeller (1839-1937), usona entreprenisto, la unua dolara miliardulo en la mondo.

9. Antaŭ 300 jaroj naskiĝis Ann Radcliffe (fraŭline: Ward, 1764-1823), angla verkistino, aŭtorino de t. n. gotikaj romanoj.

11. Antaŭ 50 jaroj mortis Maurice Thorez (1900-64), ĝenerala sekretario de la Franca komunista partio (1930-64).

12. Antaŭ 25 jaroj mortis la japana esperantista verkisto Miyamoto Masao (1913-89).

14. Antaŭ 225 jaroj (1789) ribelantoj okupis la parizan prizono Bastilio; ĉi tiu tago estas nun la nacia festo en Francio. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis la ĉeĥa kantisto Karel Gott (1939-).

15. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis la sovetunia kaj usona esperantisto Boris Kolker (1939-), aŭtoro de kelkaj E-lernolibroj.

16. Antaŭ 25 jaroj mortis Herbert von Karajan (1908-89), aŭstria dirigento.

17. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis la usona verkisto Erle Stanley Gardner (1889-1970), aŭtoro de pli ol cent krimromanoj.

18. Antaŭ 1950 jaroj (64 p. K.) en Romo komenciĝis incendio kiu detruis preskaŭ la tutan urbon.

19. Antaŭ 200 jaroj naskiĝis Samuel Colt (1814-62), usona armilfabrikisto, inventinto de la fama revolvero "Kolto". Antaŭ 125 jaroj naskiĝis Johannes Rijk Gerardus Isbrücker (1889-1967), nederlanda inĝeniero kaj esperantisto, prezidanto de la Akademio de Esperanto (1937-63).

20. Antaŭ 150 jaroj naskiĝis Erik Axel Karlfeldt (1864-1931), sveda poeto, laŭreato de la literatura Nobel-premio (1931).

21. Antaŭ 600 jaroj naskiĝis Francesco della Rovere (1414-84), papo Siksto IV dum 1471-84. Antaŭ 50 jaroj naskiĝis la germana skisaltisto Jens Weißflog (1964-), trifoja olimpika ĉampiono, kvarfoja venkinto de la Turneo de kvar trampolinoj.

24. Antaŭ 50 jaroj naskiĝis Mahoko Yoshimoto (1964-), japana verkistino kun la pseŭdonimo Banana Yoshimoto.

25. Antaŭ 450 jaroj mortis Ferdinand I (1503-64), imperiestro de S-ta Romia Imperio (1558-64).

26. En Bonaero komenciĝos la 99a UK.

28. Antaŭ 100 jaroj (1914) Aŭstrio-Hungario deklaris militon kontraŭ Serbio. Komenciĝis la Unua Mondmilito.

29. Antaŭ 1000 jaroj (1014) ĉe Belasica la armeo de la bizanca imperiestro Bazilo I venkis la armeon de Bulgario. Antaŭ 75 jaroj (1939) en Vieno komenciĝis la 31a UK. Antaŭ 25 jaroj (1989) en Brajtono komenciĝis la 74a UK.

30. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis la franca filmaktoro kaj reĝisoro Louis de Funès (1914-83).

31. Antaŭ 100 jaroj Raoul Villain en pariza kafejo murdis la francan socialiston kaj pacifiston Jean Jaurès (1859-1914). Antaŭ 150 jaroj mortis Louis Christophe François Hachette (1800-64), franca eldonisto, fondinto de la eldonejo Hachette, kiu komence de la 20a jc eldonis multajn librojn en/pri Esperanto.

Tutmonda ekzameno la trian fojon



La monda ekzameno, unuafoje okazinta en Ĉinio, kaŭzis grandan intereson inter ĉinaj samideanoj, multnombre venintaj al Tianjin.

La 17an de majo 2014 okazis la Tria Tutmonda Ekzamensio, lanĉita kaj organizita de Katalin Kováts, redaktoro de www.edukado.net.

La eventon ĉi-jare partoprenis 17 urboj el 12 landoj, entute kun 164 personoj. Jen la listo de la lokoj kun la nombro de la kandidatoj: Arras 11, Bogoto 16, Bonaero 5, Ĉeboksaro 4, Hago 5, Kuritibo 11, Chaux-de-Fonds 9, Limoĝo 8, Managvo 4, Monterrey 4, Moskvo 10, Osako 5, Parizo 7, Seulo 21, Tecámac 14, Tianjin 19, Zaozhuang 11.

Plej multe da kandidatoj varbiĝis en la ĉefurbo de Koreio, danke al la varbado de UEA-estrarano Lee Jungkee. Gratulojn kaj dankon al li! En la serio de la tutmondaj ekzamenoj aperis Ĉinio — tuj kun du urboj kaj multaj kandidatoj. Bonvenon kaj dankon ankaŭ al ili! Kelkaj urboj, antaŭe partoprenintaj, ĉi-jare decidis ripozi por pretigi por la sekva jaro pli grandan nombron de kandidatoj.

En kvin lokoj ni okazigis ankaŭ parolajn partojn. Arras, La Chaux-de-Fonds, Limoĝo kaj Tecámac jam pasintjare havis spertojn, dum Kuritibo la unuan fojon provis la novteĥnologian manieron. Nun ni uzis la programon Hangout de Google+, kaj relative bone funkciis la teknikaĵoj.

En la okazigo de la tria Tutmonda Ekzameno kunlaboris pli ol 50 personoj; sur la lokoj mem kaj ankaŭ ĉe la administrado de pagoj, kaj liverado de testoj. En la reta ekzamenado partoprenis Katalin Kováts (Nederlando), Márta Kovács (Hungario), Petra Smidéliusz

(Argentino), Zsófia Kóródy (Germanio).

Por faciligi la organizajn taskojn kaj proceduron kun la subteno de UEA, edukado.net konstruigis retan KER-agendon, kie la organizantoj povis sekvi laŭpaŝe siajn farendadojn, ricevis averton pri proksimaj kaj pasintaj limdatoj, povis marki siajn faritaĵojn. La organizantoj esperas per tio havi malpli da korespondaj taskoj kaj limigi la pli ol mil mesaĝojn, interŝanĝitajn pri ekzamenoj en ambaŭ pasintaj jaroj. Multaj el la kunlaborintoj ŝatis tiun novan laborformon.

La testojn oni skribis en du geografiaj blokoj; eŭropanoj kun azianoj, kaj la alian blokon formis la amerikaj ekzamenlokoj. Ni aplikis diversajn manie-



Managvo: KER-ekzameno estas ne movada amuzaĵo, sed serioza kaj afero.

rojn por sendi la testojn en sigelitaj kovertoj, tamen al du lokoj eĉ ĝis hodiaŭ ili ne alvenis. En Zaozhuang kaj en Managvo ni aplikis la B-planon, laŭ kiu ni kun sekurigaj kondiĉoj rete sendis la taskojn ĵus antaŭ la ekzameno. Konkludo: sekvontjare necesos eĉ pli longa tempo inter la fermo de la aliĝoj kaj la ekzamentago.

La pretiĝo al la ekzameno por la partoprenintoj signifis sisteman kaj seriozan lernadon de la lingvo. La komuna sperto de la ekzameno fortigas la komunumojn kaj donas okazon je fiero. Por tio ni lanĉis la paĝon *Pri kiu ni fieras*, kie la diplomitaj ekzameniĝintoj povas malkaŝi sian nomon. Jam legeblas el ili tie pli ol 400. Vidu ĝin: <http://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj>

Post la efektiva ekzamentago restis ankoraŭ multaj administraj laboroj. En junio kaj julio okazos la korektado kaj taksado. La rezultoj de kelkaj urboj (Hago, Osako, La Chaux-de-Fonds, Seulo kaj Limoĝo), kies testoj plej rapide atingis Budapeŝton, legeblas ekde mezo de junio en la retejo de ITK. La atestilojn ni planas enmanigi dum UK en Bonaero al la ĉeestaj kandidatoj aŭ al la reprezentantoj de la ekzamenlokoj.

Pri la evento pretiĝas resumpaĝo kun ligoj al rilataj informoj kaj fotoj:

<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/tutmonda/tria>

Se ĉiuj el la nunaj ekzameniĝintoj sukcesos, ni havos entute 1456 sukcesintojn, kaj ni havas ŝancon jarfine atingi la nombron 1500.

Katalin Kováts

Partioj kaj lingvaj rajtoj

Okaze de la eŭropa balotado Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) sendis demandaron pri lingvaj rajtoj al la partioj, kiuj ilin partoprenas. Respondis ses partioj. La respondoj montras la malsimilan vidpunkton de la politikaj partioj pri ilia maniero interpreti la lingvan justecon kadre de la Eŭropa Unio (EU).

Jen respondoj al la 4a demando: “Ĉu vi konsideras, ke la internacia lingvo Esperanto povas esti konsiderinda kiel ilo por garantii efektivan interkomunikadon en egaleca situacio por ĉiuj civitanoj de EU sendepende de ilia gepatra lingvo?”

Compromís (Kompromiso): “Ni ege ĝojus se ni povus malferme diskuti la aferon”.

Esquerra Republicana de Catalunya (Respublika Maldekstro): “La Faka Komisiono pri Lingva Politiko de ERC ne traktis tiun temon”.

Iniciativa per Catalunya Verds (Iniciativo por Katalunio — Verduloj): “Kvankam povus esti dezirebla kaj konsiderante ke Esperanto estas vivanta lingvo, ni observas certajn malfacilaĵojn en ĝia utiligado kiel komunikadlingvo en la sino de EU. Ĉiukaze, Esperanto estas tute normala lingvo kaj entenas grandan potencialon por favorigi la ekvilibron kaj la kulturalan reciprokecon inter la eŭropaj popoloj”.

Confederació Pirata (Piratoj): “La demando estus ĉu la civitanaro volas utiligi Esperanton kiel pera lingvo. Kvankam la eŭropaj institucioj prenus ĝin en konsidero, tiu devigo el Eŭropo estus sentita kiel trudo kaj kreus rifuzan senton por la elektita opcio. Male se ĝi fontus el civitana iniciato ĝi havus la necesan akcepton”.

Partit Popular de Catalunya (Popola Partio): “Kvankam ni ne adoptis pozicion sur tiu temo, ne facilas esti ĝi ŝanĝon en la Traktato por enkonduki komunan lingvon, ankoraŭ pli se temas pri artefarita lingvo”.

La kataluna sekcio de Unión, Progreso y Democracia (Unuigo, Progreso kaj Demokratio): “Ni kredas ke la enkonduko de nova lingvo en la tuta EU havus enormajn kostojn kaj ties praktika realigo estus ege diskutebla, nun mem tute ne realigebla. Tamen ni opinias ege interesa profundigi en la diskonigo de la samaj valoroj pri eŭropa civitaneco en la tuta EU, kaj tiel garantii la egalecon de ĉiuj eŭropanoj”.



Frislando: “Tutviva Lernado”, sed ankaŭ muziko kaj regaloj.

Ne nur Herzberg, ankaŭ Sieber

Herzberg-am-Harz ne estus la Esperanto-urbo, se ne estus multaj diverstipaj Esperanto-servoj kaj kulturagadoj. Inter ili estas la hotelo *Zum Pass* en la najbara vilaĝo Sieber. Ĝin gvidas la esperantlingvaj familioj Liberski kaj Khan. La afablaj familioj povas servi en Esperanto. Eĉ la manĝokarto estas en Esperanto.

La ĉarma hotelo en la bela feriovilaĝo Sieber disponas pri 20 litoj por komforta tranoktado. Pli ol 250 diverslandaj esperantistoj jam tranoktis tie.

En la montara vilaĝo Sieber (7 km de Herzberg) jam kelkfoje Esperanto-grupoj, klubanoj kaj geamikoj festis Silvestron, karnavalajn balojn, polan balon kaj la Valpurgan Nokton. Ne nur la festmanĝoj, elegantaj kaj bongustegaj bufedtabloj kontentigas la gastojn, sed ankaŭ la bona oferto de malmultekostaj tipaj germanaj kaj polaj pladoj.

La posedantino Barbara Khan ofte zorgas pri muzikgrupoj, kiuj prezentas diverstipajn muzikstilojn kaj instigas al amuzado, dancado. Al la hotelo apartenas bela “bierĝardeno”, kie ofte okazas rostadfestoj, subĉielaj koncertoj, muzikvesperoj.

En Sieber troviĝas ankaŭ subĉiela naĝejo kaj granda parko, ludejo por familioj kun infanoj. Klara akvo estas en la samnoma rivereto Sieber, apudas promenvojoj, ekzemple, la nova “Baudenstieg” (kabana pado). Proksime estas la montoj Knollen (700 m) kaj Hanskühnenburg (811 m). Sur ambaŭ montoj estas restoracioj kaj elvidturoj.

Bonvenon al la Esperanto-urbo Herzberg kune kun la vilaĝo Sieber.

Frislando kaj la frisa kulturo

Kadre de internacia kunlaboro, subtenata de la Grundtvig-projekto “Tutviva Lernado” la nederlanda fondaĵo Edukado.net inter la 22a kaj 25a de majo organizis seminarion, kies temo estis Frislando kaj la frisa kulturo.

La internacian programon partoprenis kvar organizaĵoj, entute kun 60 personoj. Ili venis el Centro de Interkultura Edukado (Nowy Sącz, Pollando), Fondaĵo Edukado.net (Hago, Nederlando), Filio de Germana Esperanto-Asocio por Klerigado kaj Kulturo (Herzberg, Germanio) kaj Kultura Esperanto-Asocio (KEA) (Budapeŝto, Hungario). La nederlandan asocion Esperanto-Nederland reprezentis Ineke Immelkamp kaj Arjen-Sjoerd de Vries.

En la unuaj du tagoj la gastoj unue turismis en Amsterdamo kaj Hago kun la gvido de la gastigantoj Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge, respektive direktoro kaj estarano de Edukado.net.

La semajnfina programo la 24–25an de majo okazis en Frislando, kie multe helpis en la programo la frisa-Esperanto muzikgrupo *Kajto*. La gastoj vizitis la frisajn urbojn Sneek, Hindeloopen kaj Leeuwarden, kie sabate ili ĝuis ankaŭ la aranĝojn de la tiea strاتفestivalo. En la hotelo de Sneek la folkloro dancgrupo *De Ljouwerter Skotsploech* prezentis sian programon kaj rakontis pri kutimoj kaj vestaĵoj.

Sekvontage du frisaj Esperantomuzikgrupoj okazigis seminarion kun muzika akompano kaj dancigo.

Kapriol' prelegis pri Frislando kaj la frisa lingvo, *Kajto* pri unikaj aspektoj de Frislando kaj ties kulturo (sporto, bestoj, manĝkutimoj kaj trinkaĵoj). Ne mankis ankaŭ viva gustumado. Frisa paro rakontis pri siaj vestaĵoj kaj vivo. La muziko kaj dancoj, en kiuj ankaŭ la gastoj partoprenis, faris la programon riĉa travivaĵo.

Pri la prelego kaj aliaj temoj pri Frislando en la sekcio “Liberaj studoj” ĉe www.edukado.net aperos dekleciana reta kurso pri Frislando kun tekstoj, testoj, sonmaterialoj kaj filmoj por ke esperantistoj tutmonde povu ekkoni niajn malkovrojn pri tiu minoritato de Nederlando.

La sekva projekto-renkontiĝo okazos en septembro en Hungario, kie la temo estos vino, ties kultivado, produktado.

Katalin Kováts
direktoro de la Fondaĵo
Edukado.net

KEA

ICH

Prezidento akceptis esperantistojn

La 11an de junio la prezidento de Kroatio Ivo Josipović akceptis delegacion de esperantistoj okaze de la baldaŭa Eŭropa Esperanto-Kongreso en Rijeka, kies aŭspicianto li estas. En la delegacio estis prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) Seán Ó Riain, sekretario de EEU Zlatko Tišljár, estrarano de EEU Nikola Rašić, prezidanto de Kroatia Esperanto-Ligo (KEL) Anto Mlinar, sekretariino de KEL Spomenka Štimec, prezidanto de Loka Kongresa Komitato Boris Di Costanzo kaj la prezidanto de Kroatia Esperanto-Junularo Đivo Pulitika.

La interparolo daŭris 30 minutojn. La delegacio prezentis al Josipović la laboron de eŭropaj esperantistoj kaj transdonis informmaterialon. Ili aparte petis lin subteni la proponon de EEU al Buroo de la Eŭropa Parlamento okazigi unu sesion de Euroscola en Esperanto.

Josipović, kiu profesie estas ankaŭ muzikisto-komponisto, interesiĝis pri muziko en Esperanto kaj petis sendi al li informojn pri tio kaj la Esperanto-tradukon de la kroatia himno.

Zlatko Tišljár

Nova estraro de EEU elektota

Laŭ la statuto de la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) ĝia estraro havas trijaran mandaton. La lastaj elektoj okazis en 2011 kaj ĉi-jare dum la asemblea kunsido en Rijeka oni elektos novan estraron. La proponon por nova estraro faras la estraro, kaj dum la asemblea kunsido la asembleanoj povas proponi pliajn kandidatojn.

La estraro de EEU, konstatinte ke la ĝisnuna estraro tre bone laboris, proponas, ke la nuna unueca teamo plu gvidu la Eŭropan movadon dum plia mandato kun unu plia membro.

La estraro proponas la jenan liston por 2014-2017: Seán Ó Riain (irlanda diplomato en Bruselo, kandidato por la prezidanto), Flory Witdoeck (belga entreprenistino, kandidato por vicprezidantino kaj kasistino), Zlatko Tišljár (slovvena kaj kroata emerito, kandidato por la sekretario), Nikola Rašić (nederlanda interpretisto kaj lingvisto, kandidato por la estrarano pri sciencaj aferoj), Peter Baláž (slovaka entreprenisto, kandidato por estrarano pri novaj teknologioj), Sandra Schweder (germana tradukistino en Bruselo, kandidatino por la estraranino pri junularaj demandoj).

Laŭ Eŭropa Bulteno



Esperantistoj konversacias kun la prezidento de Kroatio (Foto: Domagoj Opačak)

Srilanko: La unua kongreso

La unua Srilanka Esperanto-Kongreso okazis la 23–25an de majo en Ja-Ela. Vendrede, la 23an de majo, la solena malfermo, kiun ĉeestis la urbestro de Ja-Ela Anju Perera, komenciĝis per la himnoj de Srilanko kaj Esperanto kaj tradicia bruligo de torĉo.

Post legado de salutmesaĝoj kaj vespermanĝo oni rekunvenis por kelkaj interesaj ludoj.

La sabatan matenon Rafael Zerbetto parolis pri siaj Esperanto-spertoj kaj malkovris, kial Esperanto estas bezonata en la mondo kaj kiel ni povas akcepti ĝin kiel komunan lingvon.

Poste s-ino Evlali, skolta instruistino, defendis la lingvan justecon kaj montris, ke kun Esperanto ni povas sperti novajn aĵojn, kiujn ni neniam spertis. Estas nur pordo, kiu estas malferma al ni ĉiuj. Zeiter Perera, prezidanto de SLEA, paroladis pri lingva diskriminacio kaj tuŝis la historion de Esperanto-Movado en Srilanko.

Posttagemze Adeel Butt prelegis pri Esperanto-movado en Pakistano kaj instruis Esperanton al ĉeestantoj.

Dimanĉe oni diskutis, kiel antaŭenigi la movadon en Srilanko kaj akceptis kelkajn decidojn:

1. Ĉiumonate okazigi kunsidon;
2. Regule aranĝi E-kursojn;
3. Lanĉi poŝtkurson;
4. Organizi ekskurson por ĉiuj srilankaj esperantistoj;
5. Formi junularan sektion de SLEA;
6. Reklami pri Esperanto en lokaj gazetoj;
7. Formi lokajn grupojn de SLEA;
8. Alproksimigi la najbarajn landojn per Esperanto kaj fortigi la regionan movadon, organizante la 3an Sud-Azian Seminarion post du jaroj.

Adeel M. Butt

Alternativaj fontoj de energio

La tradicia Esperanto-migrado franca-germana en la Nigra Arbaro okazis la 24an de majo. La deksexopo vizitis mezepokan lignan muelejon, kiu muzeocele estas funkciigata por vizitantoj. La muelejan radon turnas eta roĝo fluanta el la mezmontaro. La sama rivereto funkcigas vicon da etaj elektrocentraloj, kiuj sume liveras la saman kvanton da elektroenergio kiel moderna ventocentralo.

La altindustriigita Germanio sub la ŝoko de la katastrofoj en Ĉernobilo (1986) kaj Fukusimo (2011), decidis rezigni pri atomcentraloj kaj bazi sian energibezonon sur nenukleaj kaj renovigeblaj energifontoj. La publika konscio pri la protektindeco de la naturo kaj la akceptiteco de la renovigebla energio en Germanio estas relative alta.

Alois Eder



Esperantistoj sur pinto (Foto: Frank Huber)

Esperantaj Tagoj de Krakovo



La 28aj Esperantaj Tagoj de Krakovo (Pollando) okazis de la 30a de majo ĝis la 1a de junio. La Tagoj, organizitaj kiel kutime de la Krakova Societo *Esperanto*, kongruis kun la festa solenado de la 650a datreveno de la Jagelona Universitato, kies historion rememorigis Lidia Ligeza.

La Esperantaj Tagoj de Krakovo ĉiam havis ambicion prezenti kulturon kaj arton. Same okazis ankaŭ ĉi-foje. Diversaj programeroj intense plenigis la tempon, destinitan al ni de la kulturdomo Podgórze kaj Shinoda-Kuracejo.

Ni havis okazon travivi la poemon de Karol Wojtyła (Johano Paŭlo la 2a) *Roma Triptiko*, tradukitan de Lidia Ligeza kaj prezentitan de la profesia aktorino Anna Ramza-Kozioł. Interesiĝon vekis referaĵo de Robert Kamiński pri la 98a UK en Rejkjaviko kaj fotoj el la fama salminejo Wieliczka prezentitaj de Andrzej Sochacki kun komentario de Magda Tatara. La ampleksa prelego kun kantoj, dediĉita al Wiera Gran, fama kantistino el la juda geto, prezentita de Tomasz Chmielik vere impresis la publikon.

Adam Łomnicki kaj Andrzej Feuer el diametre malsamaj pozicioj okupiĝis pri didaktikaj procezoj. Magda Tatara prezentis al la publiko provlecionon por la baza kurso. Andrzej Kołpanowicz interese parolis pri diversaj aspektoj de koloro ne nur en la pentroarto. La juna gimnaziano Tobiasz Kubisiowski

Krakovo: Irena Urbańska kantas kanzonojn de Mordeĥaj Gebirtig kun la piana akompano de Jacek Bylica. (Foto: Andrzej Sochacki)



rakontis pri kontaktoj inter Esperanta junularo.

La dimanĉan antaŭtagmezon la gastoj pasigis en Shinoda-Kuracejo, kiu aplikas japanan metodon masaĝi. Ĝia direktoro, d-ro Włodzimierz Opoka rakontis pri historio de la centro. La geedza paro Markéta kaj Adam Wilkus sukcese prelegis pri la 73a Hispana Esperanto-Kongreso kaj pri subĉielaj vojaĝbirdoj.

La artistan parton de la programo plenigis du signifaj eventoj.

Kantojn de Mordeĥaj Gebirtig en Esperanto kaj en la jida kortuŝe plenumis la krakova kantistino Irena Urbańska kun piana akompano de Jacek Bylica. Tomasz Chmielik kun vervo kaj vigleco proksimigis al la publiko la personecon de Mordeĥaj Gebirtig, fama popola poeto kaj bardo dum la tuta vivo ligita kun la krakova juda kvartalo Kazimierz.

La dua evento estis koncerto de du junaj artistoj, gefratoj Kołpanowicz, Julia (violono) kaj Joachim (piano), kiuj post interpreto de komponaĵoj de Liszt, Mozart kaj Ravel estis varmege aplaŭditaj.

Krakovo, unu el centroj de la eŭropa kulturo, eksa ĉefurbo de Pollando, allogas ĉiujare milojn da turistoj el la tuta mondo. Senĉese okazas kulturfestoj kun granda nombro da ekspozicioj, koncertoj kaj amasaj aranĝoj. Ni dankas al niaj fidelaj esperantistaj gastoj, kiuj elektis nian modestan programon, sed ne la samtempan “Grandan paradon de drakoj” ĉe la rivero Vistulo, apud la reĝa kastelo Vavelo.

Andrzej Kołpanowicz

Denove en la Paraiba Valo

La 1an de junio okazis en la urbo Lorena, en la brazila ŝtato San-Paŭlo, unu plia Renkonto de Esperantistoj en la Paraiba Valo. En la Kulturdomo de Lorena post akcepta lunĉo Aleksandro Prado prelegis pri rimedoj por havigo de flueco en fremda lingvo — inkluzive de Esperanto. La publiko vigle diskutis la aferon.

Antaŭ la tagmanĝo la tuta grupo promenis tra la urbocentro kun Esperantaj flago kaj rubandoj, disdonante centojn da flugfolioj, kaj vizitante historiajn konstruaĵojn. Posttagmeze oni aŭskultis “Guton da gramatiko” kaj paroligan ekzercon per projekciado de filmeto sub la gvido de José Roberto Tenório. Sekvis informoj de Givanildo Ramos Costa, Alan Argolo kaj José Roberto Tenório. Poste prelegis Maria Nazaré Laroca pri la temo “Ĉu poezio estas necesa?” kaj Francisco S. Wechsler pri la revuo *Brazila Esperantisto*.

Dum la tuta tago funkciis libroservo kaj vendejo de Esperanto-ĉemizoj kaj aliaj objektoj. La radiostacio *Aparecida* informis pri la evento. La sekva renkonto en la Paraiba Valo okazos en oktobro 2014 en la ŝtato Rio-de-Janeiro.

Paulo Sergio Viana

Denove en la Ĉeĥa Paradizo

Tra verda naturo kaj flavaj kampoj de kolzo 27 esperantistoj venis al la pensio *Espero* en la Ĉeĥa Paradizo en la vilaĝo Skokovy, kie la 12–18an de majo okazis la 39a Esperanto-seminario.

Ĉar estis inter ni nederlandano Peter Breems, lia rusa amikino Olga kaj hungarino Judith Kovács la problemo krokodilo ne estis. Ĉiuj seminarianoj estis laboremaj, kaj la komputiloj funkciis konstante. Eble niaj voĉoj restos por longa tempo memorataj danke al Pavla, Jan kaj Mira. Ni laboris por aperigi paroladojn en la asocia retejo www.esperanto.cz.

La loko, kien ni revenadas, estas iel magia, eble pro tio, ke multaj el ni jam ne povas tien ne reveni, kaj pro tio, ke la ideo de Zamenhof estas vere forta.

Kvar el ni kaj la eksterlandanojn akceptis la vicurbestro en Mnichovo Hradišti, kaj ni povis viziti la Centron por libera tempo en rekonstruita domo, kie diversaj asocioj povas senpage uzi ekipitajn ĉambrojn. Kia rara okazo...

La 40a seminario komenciĝos la 8an de septembro 2014.

Jindřiška Drahotová

Vroclavo kantas en Esperanto

La 23an de majo en Vroclavo (Pollando) okazis la 2a Eŭropa Festivalo de Esperantaj kantoj, preparita de esperantistoj (Centro de Interkultura Edukado, Regiona Buroo en Vroclavo) kaj neesperantistoj (elementa lernejo №9 en Vroclavo).

La publikon kaj la partoprenantojn en la lerneja salonego salutis la direktorino de la lernejo Anna Szanin kaj la kunordigantino de la evento, direktorino de la Centro de Interkultura Edukado (Buroo en Vroclavo) Małgosia Komarnicka. Komence ĉiuj kune kantis la Eŭropan himnon en Esperanto, kaj poste Małgosia Komarnicka tralegis la salutleterojn de la patronoj.

Ĉi-jara festivalo havis rimarkeble pli altan nivelon ol la pasintjara, kaj la ĵurio havis malfacilan taskon por aljuĝi premiojn. Dum la kunveno de la ĵurio Helena Biskup deklamis pole kaj Esperante popularajn versaĵojn, kaj Bogdan Dembiec sukcese instruis al la neesperanta publiko kanzoneton en Esperanto.

Post longa diskuto la ĵurio aljuĝis tri premiojn en la kategorio “Solisto” al: Kamila Jasionowicz el Zlotoryja (la unua premio), Tobiasz Kubisiowski el Krakovo (la dua premio) kaj Bogusia Nowak el Nadolice Małe (la tria premio). En la kategorio “koruso aŭ ensemblo” la ĵurio aljuĝis nur du premiojn. Ilin ricevis la ensemblo *Cicha woda* el Vroclavo (la unua premio) kaj la dueto *Julia i Lucja* el Vroclavo (la dua premio).

La konkursintoj ricevis diplomon, kaj la premiitoj diplomon, pokalon kaj donacon. Diplomoj estis donitaj ankaŭ al instruistoj, kiuj motivis kaj preparis siajn lernantojn partopreni la festivalon. La plenumantoj, instruistoj kaj gepatroj estis invititaj al bongusta manĝo, dum kiu oni jam iomete preparolis venontjaran festivalon.

Ĉiuj ĉeestantoj revenis hejmen kontentaj, promesante plivastigi sian repertuaron de Esperantaj kantoj. Ili certe estos bonaj ambasadoroj de Esperanto des pli, ke la 29an de majo okazis profesia surdiskigo de la premiitaj kantoj.

La organizantoj konstatis surprize grandan intereson en neesperanta medio por prezenti Esperantajn kantojn, kies vortojn oni devis parkeri, kaj bedaŭris, ke estis nur unu esperantisto...

La festivalo okazos ĉiujare, la trian vendredon de majo, en du kategorioj: “koruso aŭ ensemblo” kaj “solisto”.

Małgosia Komarnicka




Konatiĝu kun “Ŝanĝo”

Ne pasis ankoraŭ duonjaro ekde la debuto de la grupo en la Esperanta mondo, sed ĝi iĝas ĉiam pli populara en Esperantujo kvankam la grupanoj tute ne parolas Esperante! Temas pri la grupo *Ŝanĝo*, kiu debutis en ĉi-jara JES (Junulara E-Semajno en Szczawno-Zdrój). La junaj muzikistoj el Vroclavo kun multaj, ofte strang-aspektaj muzikiloj, ravis la publikon per sia nekutima muziko kun Esperantaj tekstoj.

Malofto okazas, ke popularaj muzikistoj elektas Esperanton. La anoj de *Ŝanĝo* agas en grupoj, konataj kaj ŝatataj en Pollando. Ekzemple, Kamil Rogiński, la fondinto de *Ŝanĝo*, muzikumis, interalie, en *Orkiestra Rivendell*, R.U.T.A, *Klinika Lalek* kaj *Ocelot*.

La elekto de Esperanto estas forte ligita kun la ideologio de *Ŝanĝo*: ili kredas je paca mondo de egalaj homoj, devenintaj de diversaj kulturoj kaj mondopartoj, kiuj povas kompreni unu la aliajn kaj vivi en amikeco, kvazaŭ “granda rondo familia”. Kiam mi unuafoje interparolis kun ili, mi tuj komprenis, kial ili elektis Esperanton — ili estas esperantistoj en siaj koroj!



Post dujara laboro ili eldonis sian unuan K-diskon! En ĝi Esperante kantas, interalie: Maciej Balcar el la pollanda blusroka grupo *Dżem*, portugala fadokantisto João de Sousa, aktorino Natasa Sołtanowicz, hungara ŝamanino Halina Bergerné Wilk. *Ŝanĝon* subtenas la grupo *Foliba*, kies specialaĵo estas tradiciaj ritmoj el okcidenta Afriko. La kovrilon ornamas bildoj de la gvidanto de *Ŝanĝo* Kamil Rogiński.

La JESa koncerto tiom plaĉis al junuloj, ke PEJanoj decidis plivastigi kunlaboron kun la grupo. La PEJa logo aperis sur la kovrilo de la debuta disko de *Ŝanĝo*, kies titolo estas *Ŝanĝo de la vibrado de la terglobo*. La grupo komencis koncertvojaĝon: la unua koncerto okazis en Kautzen (Aŭstrio). Baldaŭ okazos koncertoj en Varsovio kaj Vroclavo. Kiam denove en Esperanta kongreso? Ni atendas senpacience.

Romualda Jeziorowska

Migri en Burgundio

En la fama regiono Burgundio la 11–16an de majo grupo da esperantistoj el kvar landoj partoprenis la unuan Printempan Migradon. Ni profitis la pejzaĝan diversecon inter vinplantejoj, arbaroj, montetoj kaj herbejoj. La migrado permesis la malkovron de pluraj vidindaĵoj ĉirkaŭ Dijono, interalie, la monto Afrique kaj la natura rezervejo de la valeto Lavaux. La plej ŝatata estis la noktiga promenado supre de la lago Kir.

Malgraŭ kelkaj pluvetoj kaj malvarmeta temperaturo la etoso restis tre varma kun viglaj diskutoj. Post la sukceso de la unua aranĝo, la dua Printempa Migrado okazos en aprilo 2015.

Olivier Buisson

Koncize

★ Delegacio de TEJO estis inter ĉ. 5000 partoprenantoj de EYE2014 (renkontiĝo de reprezentantoj de internaciaj asocioj de EU), okazinta 9-11 maj 2014 en la Eŭropa Parlamento en Strasburgo. (*Eŭropa Bulteno*)

★ 31 maj la Maribora E-Societo havis standon kun aliaj neregistaraj organizoj en la urbeto Kidričevo (Kroatio); multaj vizitantoj de la E-stando solvadis etan taskon pri Eo. (Zlatko Tišljar)

★ 22-23 maj kadre de la internacia scienca konferenco dediĉita al la 200-jariĝo de Taras Ŝevĉenko ĉe la Orient-eŭropa universitato Lesja Ukrainka en Lucjk (Ukrainio) okazis festado de la 25-jariĝo de la Ukraina E-Asocio, kies prezidanto rakontis pri la plano okazigi UKon en 2017 en Ukrainio. (Landa Agado)

★ Studenta Scienca E-Rondo de la Jagelona Universitato partoprenis la 14an sciencan festivalon de Krakovo, kiun okazigas superaj lernejoj k sciencaj institutoj de la urbo. (Landa Agado)

★ 17 maj en la litovia radiostacio *Laisvoji banga* la prezidanto de Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio Audrys Antanaitis dum 40 minutoj interparolis kun la prezidanto de Litova E-Asocio Povilas Jegorovas. (P. J.)

★ 17 maj pli ol 300 studentoj partoprenis konkurson pri Eo en la Zaozhuang-a Universitato; la konkurson gajnis grupo el la fremdlingva instituto. (El Popola Ĉinio)

★ Kotdivuara E-Asocio aliĝis al la Pakto por la Ea Civito; samtempe kun la akcepto de KEA, la Forumo de la Ea Civito konstatis la ĉeson de la teatro *Espero* (Varsovio), post la forpaso de Jerzy Fornal. Du establoj (el Pollando k Kongolando) ne estis trakteblaj pro manko de kompletaj dokumentoj. (HeKo)

★ La prezidantino de Indonezia E-Asocio Ilia Sumilfia Dewi fine de majo dum naŭ tagoj restadis en Koreio; ŝi parolis en E-leciono de la Universitato Kyunghee en Seulo, prelegis pri Indonezio en la Rondo Verdulo, vizitis kelkajn E-kursojn. (Lee Jungkee)

★ 10 jun 2014 estis efektivigita la 143a sendo de la kampanjo “Esperanto en la Bibliotekojn” de Kultura Kooperativo de E-istoj (Rio de Ĵanejro), ĉi-foje al la biblioteko Cuca Barra en Fortalezo. Ekde julio 2001 estas senditaj pli ol 1400 libroj en/pri Eo al 131 brazilaj k 12 alilandaj bibliotekoj. (Karlo Alberto)



Audrys Antanaitis kaj Vytautas Ŝilas gvidas E-kvizon (Foto: *Virginija Valuckienė*)

Razgrad: Konkurso kaj du jubileoj

La 6–8an de junio en Razgrad (Bulgario) por la 23a fojo okazis la tradicia festo EKRA — Esperantista Krea Renkontiĝo Abritus. Ĝin organizis la esperantista kulturdomo “D-ro Kirĉev” kaj la urba Esperanto-societo “D-ro L. L. Zamenhof”. Partoprenis multaj esperantistoj el la tuta lando, kiujn Maja Gorova, vicprezidanto de la Bulgara Esperanto-Asocio (BEA), salutis nome de la Centra estraro de BEA.

Kadre de la festo estis anoncintaj la rezultoj de la Internacia literatura konkurso por la originala Esperanta poezio kaj humuro. La ĵurio donis la unuajn premiojn pri poezio al Jevgenij Georgiev el Kazahŝtano kaj Nicolino Rossi el Italio. La duajn premiojn ricevis Lenke Szász el Rumanio kaj Radoica Petrović el Serbio. La trian premion kaj premiojn por humuro la ĵurio ne donis.

Por la dua fojo estis anoncinta landa konkurso pri tradukado. Ĉi-jare oni tradukis fragmenton el la romano *Tabako* de Dimitar Dimov okaze de lia 95-jara datreveno. Kadre de la festo ankaŭ estis anoncintaj la rezultoj de la traduk-konkurso.

La razgradaj esperantistoj celebris la 90-jariĝon de la organizita esperantista movado en la urbo kaj la 30-jariĝon de la esperantista kulturdomo. Radka Stojanova, multjara prezidanto de la Esperanto-societo, rakontis pri la komenco kaj historio de la Esperanto-movado en Razgrad kaj ĝiaj pioniroj. Ivaniĉka Madĝarova, multjara prezidantino de la kulturdomo prelegis pri ĝia fondo kaj ĝia fondinto d-ro Ivan Kirĉev. Kursfinitoj ricevis atestilojn pri la ekzameno. Komence de la festo tre talentaj razgradaj infanoj salutis partoprenantojn per belaj kantoj. Fine kantis la kantgrupo *Sopiro*, funkcia ĉe la kulturdomo.

Dimitrinka Kateva

Kiam gajnas kvanto, sed ne kvalito

Aklame: “Per Esperanto por amik-eco kaj kunlaboro. Ĝis la revido!” la 11an de majo finiĝis la sepa, tradicia tendar-eto-seminario de litoviaj esperantistoj-ĵurnalistoj. Ĝi okazis en vilaĝa somer-umejo de gesinjoroj Bielinis, ĉe la sud-orienta litovia urbeto Auštadvaris.

Por la partopreno registriĝis preskaŭ 40 personoj, efektive venis 37. Inter ili esperantistoj-ĵurnalistoj ne faris la plimulton. Veraj ĵurnalistoj estis eĉ pli malmultaj (ne ĉiuj esperantistoj). La ĉeforganizanto, konata litova ĵurnalista Audrys Antanaitis, tamen esprimis sian kontentiĝon pro la partopreno pli multnombra ol antaŭe. Ĉiu veninto ricevis aranĝnoman skribilon kaj novan kantareton de Vytautas Ŝilas *Kantu kun mi*. Ĉu pravas la proverbo: “Komenco bona — laboro duona”?

Post la tagmanĝo sekvis la vigla diskuto “Esperanto per la okuloj de ne-esperantistoj”. Gvidis ĝin konsultanta entreprenisto Bernardas Ŝatkovskis. Kompreneble, en la litova. Ĝin mi ne ĉeestis — mi gvidis paroligan rondon por kvin komencantoj. Ne opinio, ke ĉiuj ceteraj estis Esperanto-parolantoj.

Konkludu mem: kiam laŭprograme devis komenciĝi komuna kantado, tiuj atingis, ke anstataŭe oni televidu Eŭrovido-Kantokonkurson. Kiam Kazys Svidenis komencis esperantlingve rakonti siajn prihindiajn impresojn, oni postulis, ke li daŭrigu en la litova! Mi tuj rememoris la sovetian tempon, kiam en mia uzino kunsido, kiun partoprenis nur unu ruso, laŭ lia postulo okazis en la rusa — “por ke ĉiuj komprenu”.

La okazinta priesperanta kvizo elvokis grandan interesiĝon (ĉiu respondinto ricevis bonan premion). La litovlingvan parton de la kvizo gvidis la verkisto Jeronimas Laučius, la esperantlingvan — Audrys Antanaitis. Sendube, multaj poste tre volonte ĝuis banadon en varmega banejo, ktp., ktp.

Multaj partoprenintoj sincere dankis al la organizantoj “pro la plezure pasigita semajnfino en la rondo de demokratiaj, sinceraj kaj bonanimaj esperantistoj”. Impresoj do estis.

Mi proponis al kelkaj kontentuloj verki ion por *La Ondo*. Senrezulte... Tial vian legaĵon verkis mi mem,

Vytautas Ŝilas

ARKONES XXX
Poznano, 26–28 sep 2014

Ĉu Bruselo decidis pri klimato?

La EU-balotoj montris, ke kreskis partioj kaj politikistoj, kiuj kontraŭas la ideon de Eŭropo, kaj ankaŭ tiuj, kiuj kontraŭas kelkajn bazajn ideojn de homaj rajtoj. La Eŭropa Parlamento (EP) devos ankoraŭfoje bonvenigi Marie Le Pen, gvidantinon de la Nacia Fronto, kiu atingis 25% da voĉoj en Francio. Ŝi volas konstrui ekstremdekstrularan politikan partion en Eŭropo. La brita kontraŭeŭropa Sendependa Partio (UKIP) atingis 27.5% — antaŭ aliaj britaj partioj. La ĉefo de UKIP Nigel Farage volas, ke Britio forlasu la Eŭropan Union (EU).

Tamen la esperantistoj povas esti kontentaj pri la rezulto de Eŭropo-Demokratio-Esperanto, kiu atingis 33 mil 115 voĉojn en Francio kompare al 28 945 en 2009 kaj 25 259 en 2004.

Post la elektoj EU estos malpli ambicia. Unu el la plej gravaj defioj povas esti senresponda — la minaco de klimata ŝanĝiĝo. En oktobro la gvidantoj de EU-landoj planas decidi pri la politiko pri klimato kaj energio. Jam komence de la jaro la Eŭropa Komisiono proponis 40-procentan redukton de forc-ejaj efikaj gasoj kaj uzadon de pli da renovigebla energio.

Kvankam facilas interkonsenti pri komunaj komunikoj, ne estas facile por la 28 EU-landoj interkonsenti pri novaj leĝoj. Nun Eŭropaj gvidantoj ŝajnas malpli decidemaj pri novaj rimedoj por redukti la uzadon de la fosiliaj (mineralaj) brulaĵoj.

Colin Roche, kampanjanto por Amikoj de la Tero Eŭropo, timas, ke la gvidantoj nun puŝas “malpurajn” fosiliajn energiojn sub la preteksto de energia sekureco. “La sola vojo al energia sekureco estas rompi la dominadon de importitaj fosiliaj brulaĵoj”, — diras Roche. Li ankaŭ alvokas la EU-landojn al evoluigo de propra, pura kaj renovigebla energio.

Laŭ Roche, la EU-propono por klimata kaj energia politiko por 2030 jam estas “danĝere netaŭga”. Roche diras, ke Eŭropo elspezas miliardojn da eŭroj ĉiujare, importante tergason kaj nafton. Li volas, ke EU tranĉu forcejajn gasojn per almenaŭ 60% ĝis 2030, reduktu la uzon de energio je 50% kaj pliigu la parton de renovigeblaĵoj al 45%.

Dafydd ab Iago

Lingvolernado per la reto



Inter multaj aferoj, Interreto estas aparte taŭga por lernado, interalie de lingvoj. Nun oni ne nepre devas iri al lingvokursoj aŭ aĉeti kostajn lernolibrojn: ebloj lerni lingvojn rete tre multiĝis en la lastaj jaroj. Estus tro longe listigi ĉiujn retejojn por lerni unuopajn lingvojn, sed indas menciigi la plurlingvajn retejojn <http://www.deutsch.info> por la germana kaj <http://www.slovake.eu> por la slovaka.

Tre populara estas Duolingo (<http://www.duolingo.com>), kiu instruas ĉefe per tradukado. En ĉiu leciono oni petas vin traduki frazojn al via lingvo aŭ al la cellingvo, aŭ skribi aŭdatajn frazojn. Duolingo estas kritikata pro tio, ke ĝi pli instruas traduki ol paroli kaj havas multajn strangajn frazojn, ĉefe komence (“La hundo manĝas abelon”), sed ĝi estas tre bona por lerni vortojn kaj bazojn de lingvo. Nun ĝi ebligas lerni kelkajn lingvojn per la angla, kaj la anglan per kelkaj lingvoj, sed multaj kursoj estas preparataj kaj kelkaj estas jam en uzebla testa versio (la hispana per la franca, aŭ la germana per la rusa).

Potencie utila retejo estas Vikilibroj (<http://www.wikibooks.org/>), fratprojekto de Vikipedio por krei liberajn lernolibrojn (ne nepre pri lingvoj). Kontrolu ĝin, verŝajne ekzistas en via lingvo lerniloj por lingvoj.

Havenda programo estas Anki (<http://ankisrs.net/>). Ĝi ebligas konservi informojn en sia memoro per sistemo de ripetataj demandoj kaj respondoj. Oni povas lerni ion ajn per ĝi (ekzemple historiajn datojn aŭ ĉefurbojn), sed ĝi estas aparte taŭga por lingvoj. Ekzistas multaj elŝuteblaj kartaroj: vi verŝajne trovos iun pri la lingvo, kiu interesas vin, sed se ne, vi povas facile krei propran kartaron. Anki estas disponebla por ĉiaj komputiloj kaj poŝtelefonoj. Retejo kun simila koncepto estas Memrise (<http://www.memrise.com/>), kiu enhavas multajn senpagajn kursojn pri lingvoj kaj aliaj temoj.

Sed la plej granda avantaĝo de la reto estas, ke vi povas ekzerciĝi kun aliaj homoj. Por praktiki skriban lingvon, mi rekomendas Lang-8 (<http://lang-8.com/>). La principo estas simpla: skribu tekston, kaj denaskuloj korektos vin. Se vi korektas la tekston de alia uzanto, via teksto aperos pli alte en la listo de korektendaj tekstoj, kaj vi pli verŝajne ricevos korekton.

Por ekzerciĝi parole, unu el la plej bonaj retejoj estas italki (<http://www.italki.com/>). Eblas pagi por individuaj kursoj kun profesoro, sed eblas ankaŭ tute senpage serĉi uzantojn laŭ diversaj kriterioj kaj facile trovi partneron por lingva interŝanĝo per Skajpo.

Matthieu Desplantes

Por pacienca kaj komprenema kunlaboro

Nia estimata Komitatano Z ŝatas verdikti; sed pli valoras pacienca kaj komprenema kunlaboro.

Malkontento estas bonvena, kompreneble, se ĝi naskas konstruan kritikon kaj novajn impulsojn. Ni bezonas pli da tiuj.

Aliflanke ne estas saĝe deskribi la laboron de la nova redaktoro post nur kelkaj monatoj, kiam tiu venis tute freŝa al sia kompleksa taskaro. Similsence, turni la ŝipon UEA en pli esperiga direkto same postulos tempon, kaj la komunajn klopodojn de multaj homoj.

La ideoj de Kamarado Z estas diskutindaj. Sed ĉefe gravas — kiel li mem diras — ne vortoj sed faroj.

Lin, kaj aliajn homojn de kritika tendenco, ni volonte bonvenigos en la plankunsidoj de Bonaero!

Mark Fettes

Prezidanto de UEA

Komitatano Z misvojas

En la juna *Ondo* (2014) Komitatano Z ridindigas la novstilan revuon kaj la strategion de UEA. Ofte mi aprezis ties kritikojn, sed tiun fojon mi kontraŭdiras. Liaj argumentoj signalas konservemon, dum la evoluo rapide plueniras.

La unuaj numeroj de la revuo *Esperanto*, verkitaj de Fabricio Valle, estis provoj kun mankoj. Nun la organo de UEA elstaras aspekte kaj parte ankaŭ enhance. Nu ankaŭ mi pridubis la fantazieron de la redaktoro, sed nia movado bezonas entuziasmon kaj vivas de ĝi. En la kolofono la redaktoro elektis la vorton “misio” kaj klarigas, kiel li konceptas sian taskon. Postuli la demision estas pli ol impertinente. Ĉiukaze mi rekomendus al scivolema esperantisto aboni tiun revuon.

Komitatano Z lamentas, ke Esperanto estu la unuaranga afero por UEA. Kiel do? Ĉu iam estis alie? Absurda konkludo. Ni estas en la 21a jarcento kaj devas havi adekvatan strategion, kvankam ĝi ne estas garantio por sukceso, sed utila bazo. Dum jaroj la asocio ne havis veran strategion, nur laborprogramojn.

Nia nekonata komitatano Z maljuniĝas kiel ni ĉiuj. Oni ne plu komprenas la mondon.

Bruno Graf



La subfakoj de merkato, aplikataj al la Esperanto-movadoj (3)

de Dennis Keefe

En la du lastaj numeroj de *La Ondo de Esperanto*, mi skribis pri la aplikado de la principoj de la arto kaj scienco de merkato al la lokaj, landaj kaj internaciaj kluboj kaj asocioj kiuj volas antaŭenigi la lingvon Esperanto. Mi substrekis, ke kiam mi parolas pri merkato kaj Esperanto, mi ne parolas pri la lingvo mem — pri ĝiaj gramatiko kaj vortostoko, pri ĝiaj historio, kulturo kaj komunumo — sed pri la varbado, informado kaj reklamado de Esperanto. Mi skribas, kiel varbi novajn membrojn, kiel informi al ekstera publiko, kiel utiligi reklamadon, por ke la movadoj ne forvelku, sed sukcesu.

Ni ne pensu, ke merkataka aliro al la defioj trovi novajn lernantojn kaj varbi novajn membrojn al niaj asocioj bezonas multe da mono por investi en merkatakaj projektoj. Fakte, la filozofio, ke per aldono da pli da mono por multekostaj interretaj projektoj, ni povas sukcesigi la Esperanto-movadon probable estas erariga. Multe da progreso por Esperanto eblas sen mono, kiel montras al ni Lu Wunsch-Rolshoven kaj lia apliko de la “gerila” flanko de merkato.

La centro de ĉiu movado devas esti la homoj. Esperanto bezonas pli kaj pli da emfazo sur homoj kaj kulturo. Poste merkato povas pli bone ludi sian **servan** rolon. La nocioj varbado, informado, reklamado estas duarangaj ideoj; plej gravas la kerno de Esperanto: la lingvo mem, la verkado de libroj kaj eseoj, la produktado de valora muziko kaj sencohavaj filmoj. La lingvo, la homoj kaj la kulturo.

Nun ni reiru al la temo: aplikado de la subfakoj de merkato al la Esperanto-movadoj. En la du antaŭaj artikoloj mi parolis pri sep el tiuj fakoj: reklamado, prezo-strategio, varmarko-strategio, klientoservo-sistemoj, segmentado,

kanalo-servado, kaj internacia merkato. En ĉi tiu artikolo, mi prikomentos tri aliajn subfakojn de merkato: merkato-esplorado (alinomebla, statistiko kaj enketado), merkato de firmao al firmao (FAFO), kaj publikaj rilatoj. Kiel en antaŭaj artikoloj, unue mi iomete klarigos el kio konsistas tiuj subfakoj, kaj poste mi prikomentos sukcesan kaj eventuale malsukcesan aplikon de tiuj subfakoj al varbado kaj informado de Esperanto. Nun, ek!

1. Merkato-esplorado

Multaj Esperantistoj jam scias, ke la nocio **celgrupo** estas unu el la plej utilaj nocioj por informado kaj varbado. Ni esploris tiun temon antaŭe sub la rubriko *Segmentado*. Sed kiaj estas la celgrupoj? Per enketado, per kvanta kaj kvalita analizo, per statistikoj, tio estas, per merkato-esplorado ni priskribas, ni komprenas, kaj ni boninformite agas rilate niajn celgrupojn.

Merkato-esplorado montras al ni ĝuste kiaj estas la celgrupoj prikonsiderataj. Utiligante statistikon kaj enketante ĉiun subcelgrupon, ni pli bone komprenas, kiuj celgrupoj indas je nia priatento, laboro kaj investo de mono. Ekzemple, se vi volas starigi Lingvan Festivalon en Londono, via esplorado probable pritraktos en kiu kvartalo estas **relative** multe da eksterlandanoj kaj studentoj (tiaj homoj kutime pli aktive partoprenas Lingvajn Festivalojn). Via enketado ankaŭ pritraktos, ĝuste kiuj instancoj, ĉu la urbo-kvartalo mem, ĉu universitato, ĉu alia sponsoro, plej favoras vian agadon. Alivorte, se estas 20 kvartaloj en Londono, vi celumas la plej bonan, laŭ la rezultoj de via merkato-esplorado; simile, se estas 50 eblaj sponsoroj, vi elektas la plej bonan laŭ viaj kriterioj.

Sen merkato-esplorado vi devos elekti tro intuicie, tro blinde. Bona, tamen malmultekosta, merkato-esplora aliro povas multobligi viajn ŝancojn por sukceso.

Se jam okazis relative sukcesa enketado kaj esplorado de la fenomeno

Esperanto, tio ofte devenas de homoj kiuj fakas pri sociologio, bone trejnita pri enketado kaj statistiko. Pensu pri la libro *The Esperanto Movement* de Forster aŭ pri *La Rondo Famila* de Nicola Rašić.

Tamen en Esperantujo ne oftas sufiĉe profesia apliko de la principoj de merkato-esplorado. Plejparto de niaj homaj esploroj estas nuraj punkto-esploroj. Ekzemple, iu esperantisto starigas la demandon al homo surstrate: “Sinjoro, ĉu vi scias, kio estas Esperanto?” Post kompilado de la statistiko, ni eklernas, ke X% de la homoj de iu urbo de iu lando scias, kio estas nia lingvo. Sed en merkato-esplorado, ĉio devas esti rigardata **relative**.

Bezonnatas multe da aliaj konsideroj. Ekzemple, kia estas la tendenco? Kreskanta, malkreskanta, stagnanta? Kia estas la rilato de Esperanto kun similaj temoj? Ekzemple, se vi demandas, “Ĉu vi iam aŭdis pri Esperanto?” demandu ankaŭ “Ĉu vi aŭdis pri Volapuko, pri Novial, pri alia planlingvo?” Se vi ne faras tiajn kontrol-demandojn, ne eblas kompreni, kion signifas jesa respondo al via demando pri Esperanto. La subfako merkato-esplorado pritraktas tiajn kaj centojn da aliaj principoj rilate bonan enketadon.

Speciale ridinda ekzemplo de neprofesia aplikado de merkato-esplorado devenas de mi mem, kiam mi ĉeestis la Roterdaman UK en 2008 kaj demandis al homoj proksime de la Centra Oficejo de UEA: “Pardonu, sinjoro, ĉu vi povas diri al mi, kio estas Esperanto?” Mi enketis eble 20 homojn, kaj en profesia enketado bezonnatas almenaŭ 600 por havi iom fidindajn rezultojn.

2. Merkato de firmao al firmao

En merkato oni klare distingas inter merkato de firmao al konsumantoj (do kiam la firmao Mikrosofto provas vendi ion al vi, la konsumanto) kaj firmao al firmao (kiam la sama Mikrosofto klopodas vendi ion al alia firmao, asocio aŭ registaro). Ni, provizore por ĉi

tiu artikolo, nomu la unuan specon de merkato FAKO (firmao al konsumanto), kaj la duan FAFO (firmao al firmao).

Ni ĉiuj ĉiutage vidas la FAKO-firmaojn kaj produktojn, kiaj trinkaĵoj de Coca-Cola, manĝaĵoj de McDonalds, ŝuoj de Nike, telefonoj de Apple, ktp. Tamen, ni kutime tute ne konas la mondon de FAFO, firmao al firmao. Kiam firmao vendas al alia firmao, la ĉiutagaj rilatoj radikale ŝanĝiĝas. FAFO koncernas longdaŭran interrilatadon, kelkfoje ĝis jardekoj, inter firmaoj; FAKO, aliflanke, estas ofte provizora, supraĵa rilato inter firmao kaj konsumanto, kiu rilato kelkfoje daŭras nur tagojn, eĉ horojn, eĉ minutojn.

Alia diferenco inter FAFO kaj FAKO estas, ke FAFO-varoj kutime estas kompleksaj kaj kreitaj speciale laŭ la veraj bezonoj de alia firmao; FAKO-varoj, kontraŭe, ne estas ĉekomence petataj de la konsumantoj, sed ĉefe altrudataj al ili. Ankoraŭ alia diferenco estas, ke FAFO-reklamado estas ofte teksta, tre longa, tre detala, tre honesta, kaj tre problemsolva; FAKO-reklamado, aliflanke, estas ofte bilda, mallonga, supraĵa kaj kaŝa, troiga kaj mensoga, kaj celas profiton per iom da mistifiko. La Esperanto-movadestroj urĝe bezonas agi malpli klaŭnece kaj multe pli FAFE, ni diru.

En Esperantujo ofte aŭdiĝas homoj, kiuj volas utiligi principojn de merkato por antaŭenigi nian aferon. Kelkaj esperantistoj pensas, ke se Coca-Cola sukcesis per bildriĉaj reklamoj kun gejunuloj petolantaj sur plaĝo, ankaŭ Esperanto per tia informado povas simile sukcesi. Ili ankaŭ kredas, ke se Apple, Nike

kaj McDonalds havas ege interesajn retejojn, ankaŭ UEA povas profiti imitante ilin (oni forgesas, tamen, ke tiaj retejoj ŝanĝiĝas preskaŭ ĉiusemajne kaj havas budĝeton de milionoj da eŭroj ĉiujare!). Tio estas, pro la fakto, ke normalaj homoj vidas nur la mondon FAKO, ili kredas, ke imitado de alies strategio povas helpi al UEA. Ĝis certa grado, jes, sed mi kredas, ke antaŭ ol elekti strategion, Esperantistoj povas profiti je la principoj de FAFO.

3. Publikaj rilatoj

Ĉi tiu subfako estas unu el la plej valoraj iloj por helpi antaŭenigi la Esperanto-movadojn. Laŭ multaj esperantistoj, la ĉefa vojo por sukcesigi nian lingvon troviĝas en 1) informado pri Esperanto al neesperanta publiko; 2) instruado, lernado de la lingvo; 3) utiligado de la lingvo por komunikaj kaj kulturaj celoj; kaj 4) uzado de Esperanto por komercaj kaj laboraj aferoj je internacia nivelo (nocioj antaŭnelonge emfazitaj de Fabricio Valle de Brazilo kaj Ĉielismo de Ĉinio). Publikaj rilatoj, kune kun la aliaj subfakoj de merkato povas multe helpi por tiuj kvar celoj.

Por atingi diversajn celojn de la Esperanto-movado, Publik-rilatisto povas publikigi **senpagajn** anoncojn, novaĵojn kaj artikolojn en amaskomunikiloj. Do firmao, organizo aŭ asocio ofte disdonas anoncojn, disaŭdigas novaĵojn kaj verkas artikolojn por tagĵurnaloj, revuoj, radiostacioj kaj televidaj kanaloj. Publikaj rilatoj ankaŭ okupiĝas pri sponsorado de eventoj, starigo de festivaloj, kaj similaj.

Profesiuloj pri publikaj rilatoj sciopovas pli bone ol la Esperantaj amatoroj aperigi favorajn, interesajn, efikajn artikolojn pri Esperanto. Mi scias tion proprasperte, ĉar dum mi loĝis en Hispanio kaj Francio, mi ofte sukcesis aperigi artikolon en loka ĵurnalo kaj partopreni intervjuon en radio kaj televido (Mi flue parolas hispane kaj france). Tamen la efikeco de miaj senpagaj aperoj en la amaskomunikiloj certe ne estos tiom sukcesa kiom tiu de profesiulo.

Tamen estas kelkaj, laŭ mi, bonaj sukcesoj kiuj montras belan vojon por la utiligado de publikaj rilatoj. En Francio

Coca-Cola estas la plej konata varmarko ("brand") en la nuna mondo, kiun rekonas 98% de la teranoj. Ĉiutage okazas ĉ. unu miliardo da aĉetoj de Kolao. Ne pro la ecoj de la "delica kaj refreŝiga" trinkaĵo, sed pro la konsekvenca reklamado, komencita en la fino de la 19a jc.

en 1988, en la radiostacio *France Inter* dum tuta monato, ses tagojn ĉiusemajne, dek minutojn ĉiutage prezentiĝis kurso pri Esperanto. Tiu kurso estis aŭdita de eble **milionoj** da homoj kaj estigis eble kvin *milojn* da leteroj senditaj al la radiostacio.

Alia kuraĝiga sukceso estas tiu de EDE ankaŭ en Francio, kiu per sia Eŭropa kampanjo en majo 2014 sukcesis estigi dekojn da artikoloj en dekoj da ĵurnaloj, artikoloj poste listigitaj rete de Henri Masson.


Estas multe da aliaj interesaj sukcesoj en multaj landoj. Ekzemple, amuzo sukceso estas la artikolo pri katoŝatantoj kaj Esperanto, verkita en Japanio, kiu aperis japanlingve en tutlanda revuo por katoŝatantoj. La artikolo parolis pri la kunveno de katoŝatantoj en la Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo (2007).

Mi profunde kredas, ke la esperantistoj kaj la Esperanto-movadoj, utiligante merkaton kaj publikajn rilatojn, povas aperigi centojn, eĉ milojn da artikoloj ĉiujare pri nia afero tra la tuta mondo. La amaskomunikiloj ĉiam serĉas ion interesan, ion novan, ion unikajn por publikigo. Nia problemoj estas ne manko de interesaj homoj, aferoj kaj temoj; nia problemoj estas, ke ni ankoraŭ ne sukcesis altiri la profesiulojn kiuj kapablas informi al **ekstera** publiko pri Esperanto kaj kontakti ĵurnalojn, revuojn, radiostaciojn kaj televidojn. Individuaj Esperantistoj, kiaj Lu Wunsch-Rolshoven, Ian Fantom, Henri Masson, László Szilvási, Emilio Cid kaj aliaj faras multon, tamen estus bone havi celstreban strategion: fokusiĝi sur informado por neesperantistoj kaj peti helpon kaj eĉ fervoron de profesiuloj pri publikaj rilatoj.

En ĉi tiuj tri artikoloj en *La Ondo de Esperanto* mi tute ne volas troigi la gravecon de merkato por nia lingvo. Merkato povas ludi sian rolon, sed la plej grava afero estas ĉiam lerni la lingvon, uzi la lingvon, krei kulturon. Per ĉi tiuj artikoloj mi ankaŭ volas montri al esperantistoj, ke merkato estas ĉielarko da prikonsiderindaj fakoj, abundo da utiligeblaj metodoj. Ke ĝi estas arto kaj scienco. Oni unue devas kompreni, kaj ankaŭ oni devas informite kaj celstrebe agi.

Estas probable, ke neniu fakkampo povas helpi al la Esperanto-movadoj pli ol merkato, ĉar ekster la lingvo mem estas la gravaj temoj informado kaj varbado, kaj tiaj temoj estas la kerno de la fako kaj subfakoj de merkato.





Okazo kaj kazo (3)

Studaĵo de Sergio Pokrovskij

Ĉu negramatika *kazo* precizigas ion?

Do, se ni tamen akceptos la indikitajn objektojn kiel atentindajn problemojn, ĉu la anstataŭa uzo de *kazo* solvos ilin kaj precizigos la scienca lingvaĵon?

Tiuj argumentoj atribuas al la ekstergramatika *kazo* precizon kian ĝi ne havas.

Antaŭ ĉio, ties signifo ne estas kontentige difinita. La difino de PV estas tro vasta, la difino de la PIV-oj estas tro malvasta por granda parto de la realaj (mis)uzoj. Fakte la kazuloj uzas la vorton paŭsante la kutimon de nacia lingvo, precipe de la angla aŭ de la franca. Sed en tiuj lingvoj la vorto *cas(e)*

- **ne estas** pli preciza ol *okazo*, kaj
- povas enteni la semantikan eron “tio, kio okazas” (kion, cetere, malimplice indikas la francaj vortaroj).

Interalie, *cas(e)* havas ĉiujn tri signifojn, listigitajn objekte al *okazo*:

- “konkreta *okazo*” aperas en la PIV-difinoj medicina kaj jura (kaj “In some *cases* people have had to wait ...”)
- “hipoteza *okazo*” (“The company only dismisses its employees in *cases* of gross misconduct”)
- la disjunkcia *okazo* (“Proof: There are two *cases* to consider: ...”)

Kp ankaŭ la modelan ekzemplon el PV: “en tiu *kazo* mi prenas pluvombreton” – ĉu temas pri abstrakta alternativa rezonado, aŭ pri ĉi-minuta, kuranta situacio?

La PIVa ekzemplo “en *plej bona okazo* ni povos alveni nur noktomeze” evidente temas pri plej bona el la eblaj *okazoj* – kaj ĝiaj kliŝaj tradukoj angla kaj franca estas “in the best *case*” kaj “dans le meilleur des *cas*”.

Mi koncedas, ke estas signifoj de *okazo*, kiujn *case* normale ne havas – ekz-e la signifo *opportunity*. Tamen tiu signifo nature sekvas el la signifo *situacio*, kiu estas por ili komuna: *profiti okazon* = *profiti la situacion*. Tio ne estas difekto de *okazo*, tio estas kaprico de *case* (kaj la franca vorto tiun signifon ja povas havi: *c'est le cas ou jamais*; vd ankaŭ ĉi-supre la samsencajn ekzemplojn pri la latina *casus*).

Cetere, strangas tiu maniero *apartig* signifojn, kroĉante ilin al signife senrilata termino gramatika (kiun Zamenhofo konscie izolis por eviti homonimion).

Disaj rompopoj

Flegante latinaĵojn, en sia longa historia evoluo la okcidentaj lingvoj akumulis multe da pruntitaj vortoj, kies kernan signifon ili ne bezonis, kaj tial pruntis nur kelkajn signifojn periferiajn. Senigite je la trunko, tiuj tigoj, ofte tre malproksimaj, ne plu prezentas konceptan unuecon kaj aspektas kiel

kapricaj homonimoj. Ekzemploj estas jam menciita *sankcio*, kaj la vortoj *akuta*, *solvi*. Mi prezentu ilin pli detale, kiel analogion por la angla *case* (sur kiu estas bazitaj la negramatikaj uzoj de *kazo*).

Akuta

Tiu vorto estas milda okazo de homonimio, oni ja ankoraŭ klare perceptas ĝian ĉefideon. Jen estas la PIV-a difino de la vorto *akuta*:

akut'a

1. Δ (pp angulo) Malpli granda ol orto ...
2. MED Presentanta fortajn simptomojn, rapide graviĝanta ...
3. (pp sono) havanta altajn frekvencojn: *akuta voĉo de knabino* ...

Ĉu el tiuj difinoj eblas kompreni, kiun ideon esprimas la kapvorta adjektivo? Kio estas la komunaĵo de angula speco, karaktero de malsano, kaj tembro de voĉo? Kial tiujn malsamajn signifojn oni esprimu per unu sama vorto?

Historie temas pri metaforaj signifoj de la nocio *akra*, kaj en multaj lingvoj tiujn signifojn oni esprimas per tiuj metaforoj. Ankaŭ en Esperanto ĝin uzas bonaj aŭtoroj:

- *akrangula supraĵo* [Auld];
akra nazo [J. Modest], *mentono*, *barbeto*;
akraj montpintoj [E. Privat] ...
- *tiaj periodoj de akra malsaniĝo ofte okazas en la daŭro de ĉiu kronika kataro* [KKK];
akraj internaj krizoj [LOdE] ...
- *eksonis virina voĉo akra kaj penetranta* [Marta];
la akra voĉo de la virino [Pro Iŝtar],
ŝriko tiom terura kaj akra [Usher-domo] ...

La metaforaj uzoj de *akra* prezentas konceptan unuecon, ili estas facile lerneblaj kaj kompreneblaj. La signifoj de *akuta* estas disaj ŝirpecoj, lernendaj aparte, al kiuj mankas komuna kerno. Tiaj vortoj estas insulto al sistemema menso, ili senbezone malfaciligas la lingvon.

La 3a signifo de *akuta* ĉi-supre evidente respondas al la metafora signifo de *akra*: “Malagrabla kaj ofende impresanta la sentojn”. Simile al *akra voĉo* oni povas paroli pri *akra gusto*, *akra tono*, *akra kritiko* ... Ĉu eblas en tiuj okazoj uzi *akuta*? NPIV tion ne ebligas. Nur kelkaj el la



metaforaj signifoj de *akra* estas elektitaj, kaj eĉ tiuj subsignifoj nur en kelkaj kapricaj kombinoj.

Paradokse, sed ĝuste pro tiu difekto (manko de kerna signifo kaj kaprica kombineblo) la vortaristoj devas listigi ĉiujn kombinojn de tiaj vortoj (dum por la vortoj konceptaj la formadon de tiaj kombinoj oni povas lasi al la inteligento de la uzanto). Tial lernanto (aŭ eĉ pli malbone, la redaktoro) trovas pretajn kombinojn ĝuste en la malesperantecaj kombinoj meta-stazaj – kaj tio puŝas la lingvon al plua degenero.

Solvi

Pli frapa ekzemplo estas la vorto *solvi*. Laŭ NPIV:

**solvi* (tr)

1. ĤEMIO Homogene kaj stabile miksi kun likvo solidon, alian likvon aŭ gason:

solvi salon en akvo [B] (...)

2. Trovi la nekonataĵon de problemo, la respondon al demando, la rimedon al malfacilaĵo: *solvi enigmon* (...)

Estas nenio komuna inter tiuj du signifoj, kaj (ekz-e) ruse aŭ turke ilin esprimas tute senrilataj vortoj. Ĉi tie la kerna ideo estas tute forgesita.

Fakte la kerna ideo de la latina *solvo* estas *malplekti, disigi*. Oni disigas salon en akvo; oni malplektas, malkomponas enigmon (kp la sammetaforan grekan *analizi*). Sed tiu liganta (!) ideo malaperis, kaj oni ne plu povas, imitante Ovidion, “solvi la geamantojn” (kvankam anglalingve ankoraŭ eblas *to dissolve Parliament*).

La negramatikaj signifoj de *kazo* estas simile fragmentigitaj rompopecoj sen klara koncepta unueco. Tiun konglomer-aĵon tenas kune nur kaprica ekstera tradicio de iuj okcidentaj lingvoj.

LINGVOPOLITIKO

Statuta tasko de la Akademio estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de Esperanto. Kiam ĝi per la Akademiaj korektoj precizigis la UV-tradukojn anglan, francan kaj polan de la vorto *kazo* aldonante la markon *gramatika*, tio estis konforma al ĝia devo. Ĝi ankaŭ devus aldoni la tradukojn *cas*, *case* por la vorto *okazo* en la partoj franca kaj angla (kiel *Fall* estas aldonita en la parton germanan).

La Akademio devus ankaŭ protesti kontraŭ la apero de la negramatikaj signifoj ĉe *kazo* en PV. Ĝi tamen ne protestis; eĉ pli malbone, tio okazis sub la prizorgo de la direktoro de la akademia sekcio pri la komuna vortaro Groĵan-Mopeno (Grosjean-Maupin), kiu ankaŭ estis la ĉefredaktoro de PV. (Oni povus objeti, ke plena vortaro devas registri la faktan uzon; konsentite, sed en multaj okazoj PV komentas lingvajn erarojn, aŭ simple markas misuzojn per “Ev”itinda; nenio simila aperas ĉe *kazo.2*, kaj eĉ male, ĉe *okazo.2* aperas referenco al tiu misa *kazo.2*, kio aspektas kiel rekomendo – oni ja normale ne referencas el norma uzo al misuzo.)

La rekomendon de PV transprenis la tradukvortaroj (menciindas, ke antaŭe Groĵan-Mopeno en siaj vortaroj Esperanta-franca kaj franca-Esperanta donis al *kazo* nur la signifon gramatikan). Post tio la lernantoj (kiuj plejparte havis nur tradukvortaron) ne povis ne konkludi, ke *case* = *kazo* (resp. *cas* = *kazo*). Verdire, tio koliziis kun la klasikaj tekstoj; nu, oni facile pardonis al Zamenhofo kaj Kabe ilian orienteŭropan malkleron.

PIV provis iom ripari la troan misuzon de *kazo*, redukti ĝin al faka terminaro. Tiu provo plene fiaskis, ĉar

- ne eblas klare disigi la signifojn de *cas(e)* kaj *okazo*, ĉar la semantika kampo de *cas(e)* plejparte koincidas kun la klasika *okazo*;
- en la tradukvortaroj la fakajn markojn “medicino, juro” oni perceptas ne kiel limigilojn, markojn de faklingvo – sed kiel indikilojn pri la celata subsignifo; t. e. ke ekz-e *case* temas ne pri skatolo aŭ uskleco, sed pri la signifoj uzataj **interalie** en juro kaj medicino.

La lasta estas komparebla kun la tradukvortaroj nacilingvaj, kp:

kaz/o case (*gram; med; law; instance*) [JW]

Fall m (Sturz) fall, tumble; (*Gram, Med, Jur*) case

La koncerna vortaro germana-angla estas kvaroble pli granda ol JW; la germana *Fall* ankaŭ komunlingve ofte respondas al *case*; sed tiujn respondaĵojn la vortaro aludas nur ĉe la samaj fakmarkoj, kiel JW kaj PIV.

Tamen ne ĉiuj cedis al la supraĵa simileco, kaj la Zamenhoha tradicio plu vivas ĉe lingve atentaj aŭtoroj. Ekz-e en la “Matematika vortaro” de M. Bavant (2003) konsekvence aperas *okazo*:

Tiun difinon oni vastigas ankaŭ al la **okazo**, kiam la du “unuaj” rektoj ne estas paralelaj [050.2, p. 34].

En PMEG aperas neniom da negramatikaj *kazoj*, sed jes ja “en tiaj okazoj”, “specialaj okazoj”, “limokazo”, “ekstremaj okazoj” ktp.

En la Akademia dokumento pri vortfarado:

Rilate la vortfaradon, oni devas distingi **du okazojn**: en la unua, la finaĵo troviĝas post unu radiko de la sama kategorio kaj sekve aldonas nenian signifon en la vorto (ekz-e: *patro, egala, ami*); en **la dua okazo**, la finaĵo troviĝas post unu radiko de alia kategorio kaj tiam ĝi aldonas al tiu radiko sian signifon (ekz-e: *patra, egali, amo*).

La kunekzisto de la du tradicioj kaŭzas perpleksiĝon kaj hezitojn ĉe diversaj aŭtoroj. En unu sama artikolo (fare de hungaro) mi vidas:

... tiam devus esti la ebena de la aksoj *y,z* paralelaj al la bildebena. En tiu **okazo** la projekciaĵo de la angulo *y,z* estus orta ...

Kaj kelkajn alineojn poste:

Pli malfacila demando estas la dua **kazo** pri la linioj. (Szabó J. *Bazoj de la stereografio*. Debrecen, 1989.)

Jen verkas franco, kaj sur unu sama paĝo aperas:

G. Scheffers konsideras unue la **ĝeneralan okazon** kiam oni havas same $d\Phi = dW$. Φ' sed poste limigas sin per la **okazo** pli interesa, kiam la multiplikado estas komuta. (...) Same Scheffers starigis nian fundamentan teoremon, laŭ kiu paraanalitika funkcio de paraanalitika funkcio estas paraanalitika, nur en **specialaj kazoj**.

(Fréchet M. *La kanonaj formoj de la 2, 3, 4-dimensiaj paraanalitikaj funkcioj // Compositio Mathematica*, Vol. 12, p. 95.)

Kp ankaŭ:

- [tia talento] **en la plej bona okazo** estas kapabla krei nur objektojn kriplajn, ĥaosajn kaj nekompletajn [Marta]
- la tiam indikita abonprezo kovris tiam **en la plej bona okazo** niajn elspezojn (Ferenc Szilágyi)
- **en plej bona okazo** ni povos alveni nur noktomeze [PIV, NPIV]



Antaŭ cent jaroj, la 28an de junio 1914, la Bosnia serbo Gavrilo Princip pafmortigis en Sarajevo la ĉefdukon de Aŭstrio-Hungario Franz Ferdinand kaj ties edzinon Sofia. La atenco de Princip iĝis *casus belli* de la Unua Mondmilito — ĉu temas pri kazo? kaŭzo? preteksto? formala pravigo?

- eĉ kleraj personoj havas preskaŭ nenian aŭ, **en la plej bona kazo**, nur mankan kaj tial deformitan bildon [Lapenna I. *Por pli efika informado*]

La provoj kompromisi, limigante ekstergramatikajn “kazo”jn al la signifoj fakaj fiaskis. La sola praktika maniero ĝin nemiskompreneble limigi kaj ĉesigi la hezitojn estas marki la “kazo”n per unu sola marko: gramatiko – t. e. reveni al la saĝa dispartigo Zamenhofs.

Laŭ la prudenta rekomendo de kamarado Ĉe, “Estu realisto, postulu la maleblan!”

KONKLUDO

Ĉi tiujn objektojn kontraŭ la ekstergramatikaj uzoj de *kazo* motivas ne religia kulto de la Fundamento aŭ Zamenhofs, sed la malracieco de tiaj uzoj. Kontraste, mi senhezite aprobas la enkondukon de *hazardo*, vorto kiu utile kaj klare transprenis unu el la eksaj signifoj de la Zamenhofs *okazo*. Nun *hazarda renkontiĝo*, *sukceso* prave forpuŝis la adjektivon *okaza* el tiu signifo; *hazardigi* (*eksperimenton*, *serĉon*) havas tute alian signifon (= *to randomize*) ol *okazigi* (*eksperimenton*, *serĉon*) ktp.

Same akceptindaj kaj utilaj estas kelkaj aliaj precizigoj, klaraj kaj unusignifaj: *akcidento*, *evento*, *eventuala*, *fakto*, *fenomeno* ...

Ne tiel estas pri la ekstergramatikaj signifoj de *kazo*. Ili ne prezentas unu klaran koncepton, kaj iliajn multajn signifojn plejparte kaj pli klare kovras la fundamentaj vortoj *okazo* kaj *afero*.

Iuj plendas, ke la rekomendo de kelkaj vortaroj “2. kazo = *okazo*.” estas ne ĉiam taŭga. Efektive tiel estas, kaj plej ofte tio signifas, ke por esprimi la celatan signifon oni prefere serĉu alian, pli ĝustan esprimmanieron. La kaŭzo estas facile komprenebla:

“Okazo” havas konceptan unuecon, kaj tial estas imuna kontraŭ kapricaj kromsignifoj (alia vorto, riĉa je figuraj signifoj, kaj tamen koncepte unueca, estas *aranĝo*). *Case* tian unuecon malhavas, kaj tial se oni trudas iujn el ties signifoj al *kazo*, mankas kriterio, kiujn oni akceptu en Esperanto: tio estas tute arbitra decido. Por iuj esperantistoj estos akcepteblaj (ekz-e)

“forta kazo”, “se tio estas la kazo”; dum la francecan-PIVan “militkazo”n (kiu en la angla *case* malhavas bazon) la samaj personoj juĝos malakceptebla. Kio ŝajnas akceptebla por unuj, estas malakceptebla por aliaj.

Ĉu ekzistas ŝanco reveni al la Zamenhofs uzo? Plu estas bonaj aŭtoroj kiuj zamenhofs uzas tiujn vortojn, kaj supozeble ili opinias tion ebla. Granda plimulto da esperantistoj simple ne estas informita – kvankam neeviteble spertas ĝenon kaj hezitojn pri la uzo: ĉu *kazo* aŭ *okazo*? La Zamenhofs uzo konsiderinde simpligas la aferon:

- Krom se temas pri gramatika termino, preferu “okazo”n.
- Se “okazo” ne bone konvenas, serĉu alian vorton, ekz-e *juĝafero*, *esploro*, *skandalo*, *ekzemplo*, *fakto*, *formo*, *kriterio*, *paciento*, *kliento* ...; *se, do* ... Kutime tio konsiderinde plibonigas la kompreneblon de la teksto.

La Zamenhofs tradicio ja plu vivas, eĉ se reduktita al la uzado de konscia malplimulto. Ĝin ĉiam komprenis kaj praktikis ne nur orientanoj, kiel Zamenhofs kaj Kabe, sed ankaŭ okcidentanoj, kiel *Henri Vallienne* en la jaro 1907a, kaj *Marc Bavant* en la jaro 2003a.

Granda plimulto da esperantistoj simple ne konscias pri la problemo, erarigite de la vortaroj kaj nacilingva inercio. Nur parto da kazuloj preferas *kazon* pro konscia vorta fetiĉismo. Ankoraŭ restas ŝanco, ke konsciigo pri la problemo revenigos nin al la racia uzo Zamenhofs.

REFERENCJO

AF. Zamenhof L. [Antaŭparolo](#) al la *Fundamento de Esperanto*.

AK. *Akademiaj korektoj de la Universala Vortaro*. En: Zamenhof L. L.: *Fundamento de Esperanto*. 10a eld / Red. A. Albault. Pisa: Edistudio, 1991. P. 237–283.

FK. *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto de D^o L. L. Zamenhof*.

GW. Waringhien G. *Grand dictionnaire Espéranto-Français*.

JW. Wells J. C. *Concise Esperanto and English Dictionary*.

KKK *Kronika katara konjunktivo* / Trad. L. Zamenhof. En: FK.

KP Vallienne H. *Kastelo de Prelongo*.

Marta. Orzeszkowa E. *Marta* / Tr. L. Zamenhof.

PG. Zamenhof L. *Plena gramatiko de Esperanto*. En: FK.

Tria Interlingvistika Simpozio

La Interlingvistikaj Studoj ĉe la Lingvistika Instituto de la universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) la 25–26an de septembro 2014 organizos sian trian internacian Interlingvistikan simpozion *Problemoj de internacia lingva komunikado kaj iliaj solvoj*.

Prelegoj pri la sekvaj temoj estas bonvenaj:

1. Naturaj lingvoj en internacia komunikado.
2. Lingvopolitiko en plurkulturaj kaj -lingvaj landoj.
3. Esperanto.
4. Aliaj internaciaj helplingvoj.
5. Lingvaj utopioj kaj artaj lingvoj.

<http://www.amu.edu.pl/~inter/>

Simpozio pri lingvo kaj egaleco



La simpozio pri lingvo kaj egaleco okazis la 29an de aprilo en Novjorko sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), la Laborgrupo pri Lingvoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj la universitato de Hartford.

UEA rolis kiel la gastiga organizaĵo kun parta subvencio de Esperantic Studies Foundation (ESF). La evento aliris ĉirkaŭ 70 homojn, inter kiuj estis reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, oficistoj de UN, universitataj, tradukistoj, anoj de UN-misioj, kaj aliaj lingvolaboristoj.

Malfermis la programon Philippe Savadogo, ambasadoro kaj konstanta reprezentanto ĉe UN de la tutmonda komunumo de parolantoj de la franca lingvo, kaj sinjorino Françoise Cestac, iama asista ĝenerala sekretario de UN pri konferencaj servoj. Humphrey Tonkin el la universitato de Hartford, iama prezidanto de UEA, prezidis la simpozion.

En sia inaŭgura parolado Mark Fettes el la Universitato Simon Fraser (Kanado), nuna prezidanto de UEA, emfazis la gravecon de la lingvoj kiel faktoron en internaciaj aferoj ĝenerale kaj daŭripova evoluigo specife. Li atentigis, ke UN donas malmultan atenton al lingvaj demandoj. Tiu manko de atento kondukas al ĝia emo, en multa ĝia laboro, funkcii desupre malsupren anstataŭ demalsupre supren.

Dek du pliaj referaĵoj estis prezentitaj:

— Lisa McEntee-Atalianis, de la Londona universitato, alfrontis problemojn en la apliko de la oficiala multlingvisma politiko de UN, specife en la ekzemplo de la Internacia Martrafika Organizaĵo.

— Britta Schneider, de la libera universitato Berlino, esploris la simbolajn funkciojn de la lingvoj preter etnaj demandoj, donante apartan atenton al popularaj uzoj de lingvoj, precipe en populara muziko.

— Terrence G. Wiley kaj M. Beatriz Arias, de la centro por aplika lingvistiko (Vaŝingtono), ekzamenis la limigojn truditajn al edukado kiel homa rajto pro neegaleca lingva leĝfarado kaj praktiko en Usono.

— Esther Schor, de la universitato Princeton, retrorigardis al la fondiĝo de la Esperanto-movado fine de la 19a jarcento kaj komence de la 20a, en la kadro de la debato inter liberalaj memportataj rajtoj kaj la rajtoj de komunumoj.

— Yael Peled, de la universitato de Montrealo kaj la universitato McGill, ekzamenis la temon “Egaleco plurale: La lingvo kaj kompleksa egaleco”, en kiu ŝi pridemandis la terminojn lingvo kaj egaleco, montrante misperceptojn eventuale proprajn al ambaŭ.

— Daniel Ward, redaktoro de la usona periodaĵo *Language Magazine*, traktis la problemon de mondlingva edukado en la angleparolanta mondo, kie en lernejoj kaj universitatoj lingvostudado daŭre falas, precipe en Usono.

— Helder de Schutter, de la Katolika universitato Leuven kaj la universitato Princeton, esploris la implicojn de mondo, en kiu la proprietado de la angla lingvo transiras al dualingvaj parolantoj, kies neegaleca rilato al la angla naskas eventualajn nejustaĵojn.

— Rosemary Salomone, de St. John’s University, Usono, alfrontis la implicojn de la kreskanta emo de universitatoj en neangleparolantaj landoj proponi edukadon en la angla, precipe en postdiplomaj studoj.

— Anshuman Pandey, de la Universitato de Miĉigano, esploris tutmondajn komputajn normojn por lingvoj kaj skribsistemoj kaj la defiojn en klopodoj krei ekvilibrantan ĉirkaŭaĵon por uzantoj de ĉiuj lingvoj.

— Eva Daussà, de la Ŝtata universitato de Novjorkio (Buffalo), proponis la ekzemplon de la kataluna kiel granda minoritata lingvo en pli vasta ŝtata kunteksto, kaj la malfacilaĵojn en kreo de egaleca lingvopolitiko, kiu konservas kaj plifortigas la minoritaton.

— Dipika Mukherjee, de la universitato Northwestern, ekzamenis religian identecon en rilato al lingvoj en Malajzio, montrante, ke oni nesufiĉe frontas la rilaton inter lingvo kaj religio, kaj atentigante, ke en Malajzio okazis falo en la rolo de la angla kiel interlingvo.

— Andrea Schalley kaj Susan Eisenchlas, de la universitato Griffith (Aŭstralio), atentigis, ke en Aŭstralio la enlandan kreskon de multlingveco akompanas kvalita falo de la aranĝoj por tia multlingveco.

Por fermi la simpozion, Mark Fettes gvidis ĝeneralan diskuton pri “tagordo por esploroj pri lingva egaleco”. Unu el la elementoj en tia tagordo, laŭ iuj partoprenantoj en la ofte vigla diskuto, devas esti esploro de la lingva situacio en UN mem.

ESF

Stipendioj por Poznano

En septembro 2014 ekos nova grupo de trijaraj postdiplomaj interlingvistikaj studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano.

Por tiuj, kiuj volus partopreni la studojn, sed kies enspezoj ne ebligas pagi ĉion, ekzistas stipendioj, kiuj kovros almenaŭ la ĉiusemestrajn universitatajn kotizojn. Ilin disponigas la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF), kun apogo de UEA kaj ILEI.

Tripersona mastruma teamo estis starigita inter ESF kaj UAM por prizorgi la administradon de la stipendioj. La komisiono decidis pri la nombro kaj valoro de la asignotaj stipendioj por la studjaro 2014-2015, kun eblo je ŝanĝoj por la postaj jaroj. Oni atendas povi disponigi stipendiojn por la tuta trijara periodo.

La limdato por kandidatiĝi por stipendio estas la 15a de julio 2014. La decidon oni komunikos al la petintoj ĝis la 10a de aŭgusto.

Legu pli detale en la retejo de la studoj:

<http://www.amu.edu.pl/~interl/>





Libroeldonado sen mitoj

de Vilmos Benczik

Inter 1976 kaj 1990 funkciis en Hungario signifa libroeldona aktivado. Ĉar mi havis la ŝancon partopreni en ĝi kaj preskaŭ sola difinis la eldonpolitikon de HEA (Hungara Esperanto-Asocio), pluraj amikoj instigis min resumi la atingojn de tiuj 15 jaroj. Komence mi rezistis, sed kun la paso de la tempo ĉiam pli mi emas rekonii, ke tio povas havi iom da utilo. Se ne alian utilon, do tion, ke tiamaniere eblas eviti naskiĝon de mitoj pozitivaj kaj negativaj.

Atentu, ke temas ne pri la literatura aŭ didaktika valoro de la eldonaĵoj de HEA, sed pri la problemoj de la eldonado kaj vendado de libroj.

Esperanto en la mola diktaturo

La plej trafa vorto, kiu karakterizis tiun situacion, estas *librosoiĝo*. Ekde la mezo de la 1960aj jaroj, paralele kun la iompostioma moliĝo de la diktaturo, la interesiĝo por Esperanto vigliĝis, la nombro de la esperantistoj kreskis, sed legaĵoj mankis. Libroeldonado estis praktike ŝtata monopolo; eĉ okaze de la 51a UK en Budapeŝto (1966) rezulte de neproporcie grandaj klopodoj povis aperi nur du esperantlingvaj libroj: *La tragedio de l' homo* kaj *Ora duopo*.

La librosoiĝon de hungaraj esperantistoj principe oni povus kontentigi per du eblaj manieroj: enlanda libroproduktado kaj libroimporto. Libroimporton malebligis du cirkonstancoj. La importon el soclandoj (Socialismaj landoj) draste limigis tiu cirkonstanco, ke libroeldonado en tiuj landoj estis same ŝtata monopolo, tial nur sporade aperis esperantlingva libro tie kaj tie. La importon el la ceteraj landoj bremsis eĉ du kaŭzoj:

1. La socialismaj ŝtatoj daŭre timis pri enfiltriĝo de nesocialismaj ideoj, kaj tial per burokrataj rimedoj daŭre malhelpis importadon de kulturaj varoj el nesocialismaj landoj;

2. la prezneloj de soclandoj kaj okcidentaj landoj estis treege malsamaj: ekzemple, libro de la eldonejo *Stafeto* dum la sesdekaj jaroj kostis en Hungario ĉ. dudekoblon de samampla hungar-

lingva libro — tiamaniere evidente mankis vasta aĉetpovo por tiuj libroj.

Kiel supre jam estis aludite, la enlandan libroeldonadon longe malebligis malpermesoj politikaj kaj ekonomiaj. Ĉi lastaj post 1968 komencis mildiĝi, ĉar pro la krizo de la centrisma ekonomia direktado la politika gvidantaro de la lando decidis fari kelkajn timemajn paŝetojn al merkata ekonomio: tio sialvice rezultigis ankaŭ ioman moliĝon de diktaturo.

Dank' al tiuj cirkonstancoj povis okazi, ke en 1975 Tibor Vaskó, sekretario de HEA, akiris malgrandan uzitan presmaŝinon (iu alta ŝtata oficejo ricevis novan, kaj la malnovan ĝi ne plu bezonis). Per tiu maŝino HEA pretigis presajojn (teknikajn priskribojn kaj similaĵojn) por diversaj entreprenoj, kaj per tio ĝi enspezis signifajn sumojn — signifajn almenaŭ kompare al la ĝis-tiamaj rimedoj fontantaj el kotizoj kaj el la magra subvencio, ricevita de la ŝtato.

La eldonado komenciĝas

La akirita presmaŝino — primitiva, trivita, ĉiutage paneanta, tamen: vera presmaŝino! — memevidente naskis la ideon produkti esperantlingvajn librojn, eĉ se komence en tre modesta teknika kvalito. Restis nur ricevi prespermeson ĉe la cenzura oficejo, sed dank' al la daŭra moliĝo de la diktaturo solviĝis ankaŭ tio. Komence la oficejo volis postuli hungaran tradukon de ĉiu eldonota libro, sed post iom da argumentado flanke de mi la oficistoj lasis sin persvadi, ke tio tamen ne necesas.

La uverturo de la eldona agado estis kvarlibra serio: *Koko krias jam!* de Ferenc Szilágyi, la poemaro *Kvaropo* (de Auld, Dinwoodie, Francis kaj Rossetti), la esearo de Lajos Tárkony *De paĝo al paĝo*, kaj kolekto de unuaktaĵoj de Julio Baghy sub la titolo *En maskobalo*. Kiel videble, ĉiuj kvar libroj estis originale verkitaj en Esperanto, kaj ĉiuj kvar libroj estis represoj. Ne hazarde. La celo de la eldonpolitiko ekde la komenco estis akceli la kulturan integriĝon de

la hungara esperantistaro en la internacian movadon, kaj tiun celon plej bone servis la akirebligo de la jam kanoniĝintaj pintaj verkoj de la Esperanta literaturo. Tio, ke represi estas pli facile, ol prepari novajn verkojn, rolis nur kiel duaranga vidpunkto.

Ŝlosila punkto de la tuta projekto estis la realisma organizado de la vendado. Tio ne estis facila afero, almenaŭ pro du kaŭzoj. Unue pro tio, ke komence eblis kalkuli nur pri la hungarlanda merkato (pere de UEA ni povis vendi nur kelkajn dekojn da ekzempleroj el ĉiu titolo); kaj due pro tio, ĉar la hungara publiko kutimiĝis al la forte subvenciitaj malaltaj prezoj de la hungarlingvaj libroj. La starto tamen sukcesis tre bone: la unuajn kvar librojn eblis aboni kune (ni nomis tion “Libroserio 1”), ĉ. por 60% de la kuna prezo de la kvar libroj — kaj dum nur tri monatoj kolektiĝis ĉ. 900 abonantoj (kun antaŭpagoj)! Mi emfazas, ke nur en Hungario! La tiama hungara esperantistaro meritas ĉian laŭdon, ja manke de ia ajn subvencio la prezo de tiuj libroj superis ĉ. trioble la prezon de similamplaksaj hungarlingvaj libroj. Tiu starto bazis la esperon, ke ni povos funkciigi libroeldonan entreprenon, kiu kapablos finance vivteni sin mem. Kaj tiel fariĝis.

En Hungario formiĝis solida libromerkato. HEA funkciigis ĉiutage plentempe malfermitan librovendejon en Budapeŝto, kies oferto daŭre vastiĝis dank' al tio, ke per interŝanĝoj venis al Hungario amaso da alilande eldonitaj Esperantaj libroj. Komprenoble tiu libroservo liveris ankaŭ poŝte; menditaj libroj alvenis al la mendinto ĝenerale ene de unu semajno.

Kiel vendi al Sovetunio?

Post la enlanda vendado la plej grandan parton de la Esperantaj libroj, eldonitaj en Hungario, englutis la sovetunia merkato.

Sovetunio estis merkato ekstreme grava por la hungarlanda Esperanta libroeldonado, pro pluraj kialoj.

Unue pro la normala Esperanta solidareco: havigi al sovetuniaj esperantistoj librojn, per kiuj ili povas intime ligiĝi al la internacia Esperanta kulturo. Tio gravas ĉefe, ĉar tiuj malmultaj Esperantaj libroj, kiuj povis aperi en Sovetunio, estis tradukaĵoj aŭ de klasikaĵoj el sovetuniaj lingvoj, aŭ tradukaĵoj de politikaj broŝuroj — ĉiukaze ili havis nete endogenan karakteron.

Due, tiu vendado estis gravega ankaŭ el financa vidpunkto, ja sovetuniaj esperantistoj estis multnombraj kaj soifaj je libroj. La vendado al sovetuniaj esperantistoj ebligis al ni atingi eldonkvantojn, kiuj grave superis la tiam kutimajn ciferojn de la tutmonda Esperanta libroeldonado, kaj dank' al tio la produktokostoj por unu ekzemplero malpliĝis. Tiamaniere ankaŭ aliaj aĉetantoj de hungarlandaj Esperantaj eldonaĵoj profitis el la vendado al Sovetunio.

Tamen realigi tiun vendadon ne estis simpla afero. Malhelpoj amasis, ilin oni povas klasifiki je tri grupoj: valutaj, cenzuraj kaj burokrataj. El ili la plej gravaj estis valutaj malhelpoj (tiujn en la nuna internaciiganta mondo junaj legantoj apenaŭ povas kompreni). Loĝantoj de la landoj de la sovetendaro estis nepagopovaj ne nur al kapitalismaj landoj, sed ankaŭ al socialismaj. Socvalutoj eĉ inter si ne estis libere ŝanĝeblaj. Cenzuraj malhelpoj ankaŭ ekzistis, ja soclandoj almenaŭ formale cenzuris ankaŭ sendaĵojn, kiuj venis el alia soclando; tamen, certe mapli rigore ol tiujn, kiuj devenis el kapitalismaj landoj.

Danke al sinoferaĵoj perantoj

La vendado al Sovetunio komenciĝis dank' al la kunlaboro de kelkaj sinoferaĵoj lokaj esperantistoj, inter kiuj la plej agema estis Johannes Palu el Estonio. Oni notu, ke en Sovetunio tia agado estis strikte malpermesita, do niaj perantoj entreprenis konsiderindan riskon.

Signifis plian problemon la sorto de

la kolektita mono, kiun ne eblis simple transsendi al Hungario. La problemo solviĝis dank' al la klopodoj de unu el la tiamaj vicprezidantoj de HEA, kiu havis altan funkcion en la Ministerio de Eksteraj Rilatoj (dum kelka tempo li estis ambasadoro en Belgio). La rubloj kolektitaj de la perantoj estis portitaj al la hungara ambasadejo en Moskvo, kaj post certa tempo la forinta ekvivalento aperis en la Budapeŝta bankokonto de HEA, kaj ĝi povis esti investita en la produktadon de pliaj Esperantaj libroj.

Tiu peranta sistemo funkciis, tamen ĝi ne estis ideala, almenaŭ pro du kaŭzoj. Unue pro tio, ke ĝi ofendis la validajn sovetuniajn kaj hungarajn leĝojn en almenaŭ deko da punktoj, do la risko estis tro granda. Due pro tio, ĉar la vendoprezoj, kiujn aplikis la perantoj, estis konformaj al la hungarlandaj prezoj — kaj tiuj superis du-trioble la kutimajn (forte subvenciitajn) libroprezojn en Sovetunio. Tiu proporcio validis ankaŭ por salajroj, do la hungaraj Esperantaj libroj montriĝis tre multekostaj por la averaĝa aĉetpovo de sovetuniaj esperantistoj.

La solvo trovita

Sovetunio subvenciis ne nur sian propran libroeldonadon, sed ankaŭ la libroimporton. La ŝtata libroeksporta/importa entrepreno *Mejkniga* (Mejdnarodnaja kniga = Internacia libro, malfondita en marto 2013) zorge kribris (unuavice laŭ ideologiaj vidpunktoj) kaj kvante limigis importitajn librojn, sed la vendoprezon de tiuj, kiujn ĝi decidis importi, ĝi konformigis al la kutima preznivelo de libroj, eldonitaj en Sovetunio. Tiun fakton mi spertis jam pli frue, ĉar kiel instruisto de la rusa lingvo mi ofte veturis al Sovetunio, kaj multekostajn hungarajn librojn (vortarojn, enciklopediojn ktp.) mi aĉetis duonpreze en la internacia librovendejo de Moskvo.

La celo do estis, ke Esperantaj libroj iru al Sovetunio per la oficialaj kanaloj. Al la hungara ŝtata libroeksporta/importata firmao *Kultúra* ĉiujare ni faris oferton (kun detalaj priskriboj pri la libroj), kiun ĝi pludonis al la sovetunia *Mejkniga*, sed tiu lasta persiste rifuzis mendi ion ajn. Post kelkjara malsukceso mi decidis fari provon: mi formulis la priskribojn de la ofertataj libroj ruslingve (ĝis tiam laŭ la deziro de *Kultúra* la priskriboj estis en la hungara, kaj la firmao ilin tradukis al la rusa) en la kutima propagandapatoso stilo de la sovetunia gazetaro. Ekzemple *La verda koro* de Julio Baghy ricevis tian priskribon: “La romaneto de la granda Esperanta verkisto-realisto priskribas la heroan batalon de la Ruĝa Armeo kontraŭ la imperiismaj invadantoj dum la civila milito”. Kaj la efiko estis mirakla: *Mejkniga* mendis tiam (kaj ankoraŭ dum pluraj jaroj poste, ĝis 1990) grandan kvanton el la hungaraj Esperantaj libroj, kaj ĝi vendis ilin en la sovetuniaj librovendejoj por ĉ. la triono de tiu prezo, kiun ĝi mem pagis por ili.

Tio tamen ne faris superflua la laboron de la perantoj, pro du kaŭzoj; unue, ĉar la importokvanto ne povis kontentigi ĉiujn aĉetemulojn, kaj due, ĉar *Mejkniga* dividis la menditajn kvantojn inter la sovetaj respublikoj proporcie al ties loĝantaro. Tio rezultigis, ke ekzemple Turkmenio (kie vivis eble dek esperantistoj) ricevis trioble pli grandan kvanton ol Estonio kun miloj da esperantistoj. La nevenditajn kvantojn *Mejkniga* jarfine resendis al Hungario. Dank' al la sagaco de la sovetuniaj esperantistoj tiu resendita kvanto neniam superis dek procentojn de la tuto — Esperantaj libroj kuŝantaj sur la bretoj de la librovendejo de Alma-Ato aŭ Frunze per privataj klopodoj trovis la vojon al la esperantistoj en Latvio aŭ Ukrainio.

Entute, dum 1976-90 HEA eldonis 138 librojn en/pri Esperanto kun la suma paĝonombro 21.429 en la suma eldonkvanto 368.948 ekzempleroj.

La apuda tabelo, eltirita el la kompleta plurpaĝa tabelo, donas imagon pri la dimensioj de la eldona kaj librovenda aktivado en Hungario. La vendonombroj al Sovetunio entenas nur la vendojn per *Mejkniga*, sed krome ankaŭ niaj perantoj vendis foje la saman kvanton, kiel *Mejkniga*.



Titolo	Jaro	Eldonkanto	Vendoj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetunio)
<i>Kvaropo</i>	1977	2000	2000 (0)
<i>25 jaroj</i>	1978	2500	2500 (200)
Gárdonyi G. <i>La steloj de Eger</i>	1980	10000	8755 (1215)
<i>Baza literatura krestomatio</i>	1982	3000	3000 (520)
<i>Gvidlibro por supera ekzameno (4a eld.)</i>	1983	2000	2000 (520)
Lienhardt A. <i>Amuza legolibro en Esperanto</i>	1984	2860	2860 (1920)
Nemere I. <i>Febro</i>	1984	1500	1500 (1060)
Seppik H. <i>La tuta Esperanto</i>	1985	2530	2115 (1317)



Apollón Nikolájevič Majkón naskiĝis la 23an de majo (Gregorie: la 4an de junio) 1821 en Moskvo, en la nobela familio de la pentristo Nikolaj Majkov kaj verkistino Jevgenija Majkova. En 1834 la familio ekloĝis en Peterburgo, kie li studis en la jura fakultato de la Peterburga universitato kaj poste eklaboris en la ŝtata fiska departemento. Danke al la subvencio de la imperiestro Nikolao la Unua, Majkov pasigis du jarojn eksterlande, studante arton, kaj post la reveno al Ruslando (1844) iĝis ŝtatoficisto; ekde 1852 dum pli ol 40 jaroj li laboris en la cenzura administr-ejo, fine kiel prezidanto de la komitato pri cenzurado de eksterlandaj presaĵoj.

Majkov ekverkis tre frue kaj en la 21-jara aĝo aperigis sian unuan poemaron, kiun sekvis pliaj poemaroj, dramoj kaj tradukoj. Majkov poeziis plejparte pri la naturo kaj historio; en liaj “verkoj de bono kaj belo” sentiĝas influoj helena kaj malnovrusa. Pro sia skeptika rilato al la okcident-eŭropa kulturo li estis forte atakata de la “progresemluloj”. Multaj liaj poemoj danke al muzikigo de Ĉajkovskij kaj Rimskij-Korsakov estas kantataj ĝis nun. Majkov mortis la 8an (20an) de marto 1897. Al la rusa kulturo kontribuis ankaŭ liaj fratoj: kritikisto Valerian, prozisto kaj tradukisto Vladimir, literaturhistoriisto kaj bibliografo Leonid.

AIKo



Poemoj de Apollon Majkov

AL PRIAPO

*Faris ĝardenon mi; tie sub fagoj disbranĉaj
En frida ombro starigis Priapan statuon.
Li, kultivanto de pacaj ĝardenoj, gardanto
De ĉiuj boskoj, ĝarden-laboriloj kaj floroj,
Donas al junaj arbetoj la forton por kreski,
Dotas per verdaj folioj, per fruktoj sukplenaj.
Ĉe la statu', el la groto elfalas bruante
Fonto hel-akva, kaj ĝin superŝirmas per branĉoj
Kverkoj, sur tiuj nun turdoj konstruas la nestojn...
Estu indulga, gardanto de l' paca ĝardeno!
Vi, ho kronita per krono, plektita el vitoj,
El flavaj spikoj, hedero! Disverŝu la benon
Vi malavare sur la laborilojn plej simplajn,
Sur la fosilon, kaj serpon rond-arkan, kaj sokon,
Kaj sur la korbojn, per fruktoj plej dense ŝarĝitajn.*

PENSO

*Similas helan tagon senperturba viv'
Printemp-diluvon — vivo plena de alarmoj.
Jen tie — sunradi' kaj ombro de oliv'
Ĉi tie — fulmoj, tondroj, ankaŭ larmoj.
Ho! brilon de printempo volas mi en tut',
Kaj dolĉon, kaj amaron de la larmogut'!*

EPIGRAMOJ

*Parolu kun popol' sen timo lasi tuton —
korupti korteganojn, sed en pleja grad'
la oficulojn. Car', komencu sen kompat'
Pro ŝtel' sur Ruĝa plac' publikan ekzekuton.*

*Da sentaŭguloj famili'
Per riĉ' kaj klin' ceremonia
Regadas super la patri',
Spitante al leĝaro ĉia,
staradas dense ĉirkaŭ tron' —
avida mopsa koterio —
kaj simplanimas en rezon':
“Nur ni ja estas land' Rusio!”*

* * *

*Feliĉo?..
Estas vivo-pad',
laŭ dev' — obstini en irad',
spit'al kanajl', ĉe l' bar' ne cedi,
esperi, ami, ankaŭ — kredi.*

* * *

*Hirundet' aflugis
El trans maro vasta,
Kaj ekkantis gaje:
Februar' koleru,
Marto ĉiel mornu,
Estu neĝ' aŭ pluvo —
Ja printemp' odoras!*

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**

Kulturo

Zenon Klemensiewicz

“Profesoro Zenon Klemensiewicz inter 51 viktimoj de aviadila katastrofo!” — informis la unua paĝo de la ĵurnalo *Trybuna Ludu* la 3an de aprilo 1969. Mi tiam estis ĵurnalisto de la studenta semajnevuo *itd.* Kelkajn semajnojn pli frue mi vizitis Krakovon, por raporti pri instruado de Esperanto en la Jagelona Universitato.

Zenon Klemensiewicz (1891–1969) dum multaj jaroj estis elstara profesoro en tiu prestiĝa altlernejo, kaj danke al li Esperanto estis tie regula studobjekto. Instruis ĝin Mieczysław Sygnarski. Li estis amiko de la profesoro kaj invitis lin ĉeesti la lecionon, pri kiu mi intencis raporti. Mi trafis tiam unikan okazon paroli en Esperanto kun prof. Klemensiewicz antaŭ studentoj. Verŝajne li deziris demonstri al ili la praktikan funkciadon de la lingvo. Poste li mal-longe prelegis kaj finis per jena sentenco: “Esperanto estas frukto de la pola kulturo”.

Tiu “pola kulturo” estis memkomprenebla kiel la “eŭropa kulturo”. Tamen tiam “forte staris muroj”, kiuj per kontraŭstaraj ideologioj dividis la popolojn de la malnova kontinento, kaj ne estis facile aludi ĝian kulturalan identecon. Ni, aktivuloj de Pola Esperanto-Junularo, entuziasme ekspluatit la aksiomon de la eminenta lingvisto en nia posesperanta propagando.

Prof. Klemensiewicz multfoje uzis sian aŭtoritaton por pledi pri Esperanto. Liaj argumentoj estis troveblaj en diversaj publikaĵoj.

“Certe la lingvistika streĉo de d-ro Zamenhof estis sendube granda kaj fruktodona, kion jam agnoskis interalie la plej eminenta pola lingvosciencisto Jan Ignacy Baudouin de Courtenay. En la kadro de mia scienca kompetenteco mi povas esprimi mian opinion pri la lingvistika aspekto de tiu ĉi lingvo internacia... Esperanto estas antaŭ ĉio kreitaĵo de prudenta lingvistika produkto. Esperanto baziĝas sur gramatikaj kaj vortaj fundamentoj de la hindoeŭropaj lingvoj, kiujn uzas multaj milionoj da homoj. El la gramatika sistemo de tiuj ĉi diversaj lingvoj la kreinto de Esperanto, polo — d-ro Zamenhof, elektis lerte tion, kio estas komuna por ili — sed la plej simpla, kaj subigis tion al sen-escepta regularo. Ne tro multa provizo da silaboj, enestanta en la fonologia sistemo de Esperanto, troviĝas en tre multaj naturaj lingvoj. Pro tio



ilia prononcado ne kaŭzas malfacilaĵojn. Sed kredeble la plej egan faciligon ni trovas en la lernado de la vortrezoro dank’ al la du principoj de ĝia konstruo: la disvolvita sistemo de la uzado de la sufiksoj kaj prefiksoj. La semantikaj kategorioj, fiksitaj de ili, ampleksas principe ĉiujn pli gravajn fakojn, klasojn”. (Laŭ W. Włodarczyk, p. 46-47)

La supra citaĵo estas nur fragmenta ekzemplo de la ĝenerale pozitiva pritakso de Esperanto fare de prof. Klemensiewicz. Li ne nur teoriumis pri la Zamenhofa lingvo, sed ankaŭ ĝin praktikis.

“La komenco de mia interesiĝo pri la esperantaj lingvo kaj organizaĵoj atingas la gimnazian periodon en Nowy Sącz, kiam mi havis 14–15 jarojn. Kelkaj miaj kolegoj arde ekfervoris pri Esperanto, dum multaj horoj ni kune interparolis en tiu ĉi lingvo kaj korespondis kun la tuta mondo”. (samloke, p. 48-49)

En 1909 Zenon Klemensiewicz ekstudis en la Jagelona Universitato en Krakovo kaj aliĝis al grupo de studentoj-esperantistoj. La protektanto de ilia rondo estis prof. Odo Bujwid, fama esperantisto. Ankoraŭ kiel studento Klemensiewicz debutis en la Esperanta literaturo per sia traduko de la novelo *Sur Olimpo* de Henryk Sienkiewicz.

Poste lia scienca laboro bremsis lian aktivan okupiĝon pri Esperanto, sed ankoraŭ en 1964 li diris: “De tempo al tempo mi havas kontakton kun esperantistoj, unuavice kun la Krakova filio de Pola Esperanto-Asocio”.

Li estis honora membro de PEA. Tiutempe ankaŭ ne malaperis de lia horizonto la Lingvo Internacia. “Mi komprenas, ke devas kreiĝadi novaj vortoj por novaj konceptoj kaj nomoj de objektoj. Sed ne ŝajnas al mi ĝusta la

enkondukado de novaj vortoj anstataŭantaj la ĝisnunajn, precipe kiam ili rompas la regulojn de la tradicia Esperanta vortfarado. Oni devas treege lerte gardi la evoluon de Esperanto kiel lingvo, por ke ĝi ne postrestu la vivprogreson, sed aliflanke per troa liberalismo ĝi ne atingu la embarason de riĉeco, kiu povas difekti unu el fundamentaj principoj kaj avantaĝoj de la lingvo internacia, nome ĝian simplecon kaj unusignifecon de la vortkreaĵoj”. (samloke, p. 48)

Zenon Klemensiewicz impresis min kiel tipa ekzemplo de modesta saĝulo. Fakte li enskribiĝis en la polan lingvistikon kiel unu el ĝiaj plej eminentaj aŭtoritatoj. Longa estas listo de liaj sciencaj verkoj. Oni kalkulis sescenton da diversspecaj publikaĵoj. Granda parto da ili koncernas sintakson de la pola lingvo. Alia grava kampo de liaj esploroj estis la historio de la pola lingvo. La procedon de ĝia evoluo li priskribis ekde la plej malnova tempo ĝis la aktuala stato. Krome li okupiĝis pri la lingvo de arto kaj pri didaktiko de la gepatra parolo. Prof. Klemensiewicz estis ankaŭ populariganto de la lingvoscienco kaj aktivis en multaj organizaĵoj. Li estis longjara efektiva membro de la Pollanda Akademio de Sciencoj kaj dum kelka tempo ĝia vicprezidanto. Li estris la Instituton de Lingvoscienco de la Akademio de Sciencoj kaj membris en la redakta komitato de vortaro de la pola lingvo.

Ĉio ĉi estas nur parto de la senlaca aktivado de prof. Klemensiewicz. La lasta el liaj sciencaj agoj estis esplorado de gazetara lingvo. Lia elstara disĉiplo fariĝis Irena Tetelewska, kies publikaĵojn mi uzis, studante la ĵurnalismen en Varsovia Universitato. Ĝuste kune kun ŝi prof. Zenon Klemensiewicz estis revenanta el Varsovio al Krakovo la fatalan tagon. La aviadilo pro nekomprenebla kialo ne surteriĝis en Krakovo, sed daŭrigis flugi suden kaj proksime al la ĉeĥoslovacia limo ĝi falis teren. Ĉiuj pasaĝeroj pereis. La kaŭzoj de la katastrofo neniam estis klarigitaj. Normala afero tiutempe.

Roman Dobrzyński

Bibliografio

Golec, Józef. Słownik biograficzny esperantystów polskich. Cieszyn, 2010.

Klemensiewicz, Zenon. *Esperanto w oświeceniu lingwistycznym*. Warszawa, 1959.

Włodarczyk, Walerian. *Esperanto? Eldiroj de eminentaj polaj intelektuloj*. Warszawa, 1964.

Du frapoj

Lleshanaku, Luljeta. *Lundo en sep tagoj*: [Poemaro] / Tradukis el la albana Tomasz Chmielik, Bardhyl Selimi. — Świdnik: [Tomasz Chmielik], 2013. — 70 p., il.

Malferminte ĉi libron mi eksentis obtuzan frapon kontraŭ la cerbon. “Ve, ja ankaŭ ĉi tie ritmaj vortoj...” — ekveis mia memo. Nu, kion fari? Mi apenaŭ toleras tiaspecan produkton de la homa intelekto kaj plene konsentas kun Platono, kiu en siaj utopioj trovis lokon por ĉiuj, krom versuloj. Tiu bando de ritmuloj estas preta ritmigi “paŭzon — naŭzon”, “umon — rektumon”, kaj vendi eĉ sian propran patrinon por ricevi verson. Baldaŭ eĉ kortaj hundoj bojas verse.

Ne, ne, mi ne estas sovaĝulo. Havas mian panteonon de poetoj. Poetoj, sed ne tiuj vortotorturistoj... Kvankam mi ĉiam dorlotas etan esperon renkonti ion samgrandan kun versoj de Omar Ĥajam, Miĉjo Anĝelo, Anna Aĥmatova k. a. Krom tio mi estas ŝparema, se ne diri avareta persono. Do, la libro akirita devas esti legita.

Malferminte la libron, mi estis surprizita. “Albana Literatura”. Strange. Dum mia sufiĉe longa vivo mi legis multe da tradukoj el diversaj lingvoj, sed neniam el la albana. Sendube, mi aŭdis pri Enver Hoĝa, sed dum ia ajn diktatoreco liberpensuloj scias forgliti de premo kaj persekuto. Mia scivolemo kreskis, kaj mi eĉ rapidis legi la unuan poemon *Meditoj dum razado*. Legis kaj ricevis la duan frapon. Agrablan. Kvazaŭ patro post sinrazado. Nu, mi ja ĉiam gapis tiun riton, mistikan por mi. La samon faris mia filo. Mi sinkis nostalgion. Kaj sinkis plu post *Listo de farotaĵoj*:

*Mi promesas al mi, ke baldaŭ mi vizitos vin,
sed mi pretas neniam, kiam tio koncernas vin.*

*De kiam vi estas nur sekva punkto
en mia listo de farotaĵoj,
ĉiam mi trovas ion pli urĝan.
Ĉar vi povas atendi.*

Nu jes, por veninta, tamen, balbuti: “Nu panjo, nu... tion... alion...” Eterna temo de patroj kaj filoj. Nun mi, samkiel multaj el vi “scipovas atendi”, kaj tio estas bona. Aliajn punktojn ili tamen plenumas por sia sukceso. Pliaj versoj:

*Sufiĉas flari la odoron de tomatoj,
por revenigi en la memoro la ĝardeneton de l' infaneco
distranĉatan de akvotorentetoj sveltaj
kiel anasaj gorĝoj.*

La senton de la dolĉa melankolio anstataŭigis sento de amaro. Flavaj libroj. Libroj malpermesitaj en la komunisma tempo. Idiotaĵo flanke de la reĝimo.

*Se vi manĝas libron, vi formanĝas vin,
pecon post peco, de la kornoj internen,
kiel rikoltmaŝino en la
kolektivaj farmoj.*

Jen trankvila frisko de:

*Kiam vi proksimiĝas al la kvardeko
aŭ pli bone: se vi proksimiĝas al la kvardeko,
ĉar la kvardekjariĝo ne ĉiam estas regulo,
sed elekto...*

O, ho, ho... mi jam estas multe pli ol kvardekjara.

La libro ja elradias forton. Trankvilan kaj neniam falsan forton. Ne sen ironio en *Kiel, diable, surmeti tiun ĉemizon?*

*Kiel surmeti tiun malbenitan ĉemizon?
Se inversigi ĝin, etikedo aperas sur la gorĝo,
Kaj la produktomarko sufokas la spiron.*

Mi volonte citus la tutan libron. Ĝi indas tion. Indas ian Panteonon. Persone de mi povus esti nur unu eta riproĉo — la libro estas tro maldika. Sed tute senriproĉa estas tradukado. La falso en tradukado ĉiam sentiĝas, la teksto, ĉu proza, ĉu versa, iĝas lama, sengusta. Mi trovis nenion similan. Mi eĉ konfuzon trafis traleginte la lastan “verson”:

*La sekva atestanto 62
Vi estas unu el ni 63
Kelkaj spasmoj de l' diafragmo 64
En la loko sen nomo 65
Por sproni iom da atento 66*

Nur ekvidinte la ciferojn dekstre, mi komprenis, ke mi jam legas la enhavtabelon de la libro. Nu, la libro, en kiu eĉ la enhavtabelo sonas verse, nepre devas esti aĉetenda.

VikS

Omaĝe al Marjorie Boulton

La 22an de majo en la kolegio Somerville (Oksfordo) okazis festeto omaĝe al la 90-jariĝo de Marjorie Boulton, ne nur grava verkistino, sed ankaŭ eksstudentino de la kolegio. Ĉe- estis ĉirkaŭ 20 personoj, ĉefe esperantistoj, kiuj venis de Britio (i.a. Paul Gubbins, la prezidanto de EAB, John Wells, Edmund Grimley Evans) kaj pli foraj: Brian Moon, Claude Nourmont, Anna Löwenstein. Pluraj amikoj povis virtuale ĉeesti, ĉar oni montris surekrane salutmesaĝojn senditajn de kelkaj landoj, i.a. de Novlando en Kanado. Ne mankis skribaj salutoj, ekzemple, de la Akademio de Esperanto.

Alparolis la ĉeestantaron Paul Gubbins kaj la kolegiestrino, Alice Prochaska. Ankaŭ Marjorie parolis angle kaj Esperante pri siaj spertoj en la kolegio kaj en Esperantujo. La kolegio entuziasme apogis la eventon kaj muntis belan ekspozicion de verkoj de Marjorie, inkluzive de ŝia neeldonita taglibro pri la dummilitaj spertoj kiel studento en la kolegio (en la angla). La tuta programo daŭris proksimume unu horon, post kio oni tagmanĝis kaj babilis en bela etoso. Franĉjo Veuthey, kiu ankaŭ partoprenis, afable filmis la aranĝon.

Geoffrey Greatrex



Festa torto por Marjorie (Foto de Tim Owen)

Biblioteka Apogo Bachrich

Dank' al malavara donaco de la gefiloj de Johano kaj Maria Bachrich, UEA denove starigis fondaĵon por subteni la pliriĉigon de la kolektoj de Esperanto-bibliotekoj. Ekde 1997 funkciis Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kies kapitalo elĉerpigis en 2011. Lastatempe la gefiloj de ges-roj Bachrich donacis al UEA \$20 mil (ĉ. 14 mil 500 eŭroj) kiel kapitalon de la Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich. La Estraro de UEA akceptis kun granda dankemo la donacon, kiu laŭ la interkonsento kun la gefiloj Bachrich ebligis subvenciojn dum dek jaroj.

Johano (Juan) Bachrich naskiĝis en 1921 en Vieno kaj lernis Esperanton en 1938 en Zemun (Jugoslavio). Ekde 1948 li vivis en Venezuelo. Li estis longe la motoro de Venezuelana Esperanto-Asocio, kiun li reprezentis en la Komitato de UEA ekde 1978 ĝis sia forpaso en 2005. Li estis ankaŭ mecenato de la movado, kontribuante, inter alie, al la realigo de la instruaj videoprojektoj *Mazi en Gondolando* kaj *Esperanto: Pasporto al la tuta mondo*. En 2000 li fariĝis Honora Membro de UEA. Lia edzino Maria, ankaŭ esperantisto, naskiĝis en 1936 kaj forpasis en 2011.

Biblioteka Apogo Bachrich disdonas subvenciojn unufoje ĉi-jare. Ili estas celitaj al Esperanto-bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia nemovada instanco. Diference de la iama Apogo Thorsen, kiu subvenciis nur akiron de libroj, la subvencioj estas uzablaj ankaŭ por aliaj varoj aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA.

Por peti subvencion, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj aŭ aliaj varoj, ordigitaj laŭ prefero. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 30a de aŭgusto papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ retroŝte: direktoro@co.uea.org

GK UEA

Nova vicredaktoro de "Femina"



La ruslingva publicistino Polina Kalnitskaya estas la vicredaktoro de *Femina*, ekde la 37a numero (printempo 2014). Iom pli ol kvardekjara, Polina Kalnitskaya instruas en Moskvo pri etiko en negocad kaj profesias kiel sendependa ĵurnalistino. Patrino de du plenkreskaj filoj kaj edzino de entreprenisto, ŝi aktivas por feminismo.

Kalnitskaya partoprenis en la 4a Ateliero de FEM (Ĉaŭdefono, 2013) kaj ĵus komencis trejniĝon en la 5a Ateliero, en Budapeŝto. Ŝi regule kontribuis al la lastaj numeroj de *Femina* en strikta kunlaboro kun la redaktoro Perla Martinelli.

En la redakcio ŝi specife sekvas la evoluon de la feminisma movadoj en la mondo, inkluzive de partopreno en internaciaj kongresoj kiel korespondanto kaj de intervjuoj al gvidantinoj. Lingvan perfektigon ŝi ricevos ĉe Kultura Centro Esperantista, okaze de Plurnivela Internacia Kursaro (14–20 jul 2014).

HeKo

Ricevitaj libroj

Lleshanaku, Luljeta. *Lundo en sep tagoj*: [Poemaro] / Tradukis el la albana Tomasz Chmielik, Bardhyl Selimi. — Świdnik: [Tomasz Chmielik], 2013. — 70 p., il. — [Recenzoekzempler].

Sobolewski, Wojciech. *Bydgoszcz por eksterlandaj turistoj = Bydgoszcz dla turystów zagranicznych* / Tradukis el la pola Andrzej Korniluk. — Bydgoszcz: Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo, 2014. — 20 p., il.; 2000 ekz. — [Donaco de ISTK].

Wojtasik, Mieczysław. *Pikiloj de vivo: Aforismoj kun ekologio fone = Kolce życia: Aforizmy z ekologią w tle* / Tradukis el la pola Jam Skonieczka. — Kruszyń Krajeński: Skonpres, 2013. — 20 p., il.; 1000 ekz. — [Donaco de ISTK].

Алексеева, Ирина Саверьевна. *Ода Самарканду*: Стихи, переводы на 62 языка, эссе / Редактор-составитель Анатолий Ионесов; Предисловие Анатолия Ионесова, Владимира Ионесова. — Москва: Юность, 2013. — 100 с., ил.; 500 экз. — [Donaco de Irina Aleksejeva, kun dediĉo].

P. 80. *Odo al Samarkando* / Tradukis el la rusa Vladimir Masalkin.

Ricevitaj gazetoj

Dia Regno, 2014/2; Esperanto Aktualaj, 2014/3; Esperanto Aktuelaj, 2014/2; Esperanto en Azio, 2014/83; Heroldo de Esperanto, 2014/2,3; La Gazeto, 2014/172; La Ondo de Esperanto, 2014/6.

La unua LF de Minnaja-Martinelli

La aprila numero (268) de *Literatura Foiro* estas la unua realigita de la ĉefredaktoro Carlo Minnaja kaj la grafika redaktoro Perla Martinelli.

La ĉi-jaraj kovropaĝoj elstarigas verkojn ne esperantlingvajn kie rolas ankaŭ esperant(ist)o. Antaŭ cent kvindek jaroj naskiĝis Miguel de Unamuno, unu el la plej influaj hispanaj aŭtoroj de la dudeka jarcento, kaj antaŭ cent jaroj (1914), aperis lia romano *Niebla* (Nebulo), kie rolas la prototipo de nia verda propagandisto. Apud fragmento, tradukita de José Fernandez Arroyo, estas eseo de Otto Prytz.

Preter la sinprezento de la nova ĉefredaktoro, la cetera enhavo paŭsas la kutimon: la poezian uverturon ni ŝuldas al Nicola Ruggiero, en sociajn temojn de la frukristanisma tempo nin kondukas Gerrit Berveling. Ke la sama amuza fabela rakonto el la "fekunda lunfalĉilo" povas havi malsamajn versiojn en la diversaj kulturoj, rakontas al ni Fabrizio Pennacchiotti. Same fabelan etoson oni trovas en la legendoj pri Trentlando, kie nanoj, reĝoj kaj princinoj moviĝas inter montoj, kasteloj, sorĉoj, ĉielo kaj tero.

Enestas intervjuo kun Eugene de Zilah kaj la dua parto de la satiraĵo de Vinko Ošlak pri Pseŭdsokrato. Por la "sepa arto" Giorgio Silfer recenzas japanan filmon. Poezian interludon proponas Carmel Mallia el Malto, pri lingva subtilaĵo okupiĝas Perla Martinelli, kaj al antaŭe aperinta artikolo reagis, malsamvidpunkte, Francisko Degoul kaj Marie-France Conde Rey.

Julia Sigmond recenzas antologion de la itala verkisto D'Annunzio, Zlatoje Martinov recenzas kvarmane verkitan originalan romanon (sonaton dutonalan), kaj Nicolino Rossi eseas pri la poeto de la ĉi-numera uverturo.

HeKo

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijk 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la martaj *Proverboj trovendaj* venis 14 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Brian Bishop, Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Johan'-Luko Tortel (Francio), Edeltraut Henning (Germanio), Maria Boharewicz, Dorota Burchardt, Antoni Gradek, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Svetlana Konjašova, Maksim Kostromin, Oleg Vasiljev (Ruslando), Vasil Kadifeli (Turkio). La loto donis premion al **Brian Bishop**; la redakcio gratulas lin!

La solvoj: Se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas. Avarulo kaj porko estas bonaj post la morto.

Sudoku

2								9
	3							1
4			7		8			6
		9		7		1		
	7			3			8	
		3		5		6		
5			4		2			1
	8						2	
3								5

Sudoku estas japana enigmo. Necesas plenigi la kampojn per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en la kvadratoj 3×3 la ciferoj ne ripetiĝu. Viaj respondoj venu al la redakcio antaŭ la 10a de septembro 2014.

Komputile kompilis **Aleksej Korĵenkov**

Kelkaj diroj de inoj kaj viroj

Karlo venigis hejmen sian amatan junulinon kaj prezentis ŝin al la patrino:

— Panjo, ŝi estas mirinda junulino. Ŝi eminente kuiras, bonege kudras, akurate ordigas loĝejon...

— Bonege, filo! Kontraŭ 20 eŭroj tage ŝi venu al ni en ĉiuj mardoj kaj vendredoj.

* * *

Ludoviko rakontas al sia edzino, kiel bonŝance li sukcesis aĉeti duonpreze porbiciklan lanternon.

— Kial vi ĝojas? Vi ja ne havas biciklon, — rimarkigis la edzino.

— Aŭskultu, — koleriĝis Ludoviko, — mi ja ne komentas kiam vi aĉetas mamzonon.

* * *



Malfruvespere ebria Petro revenas hejmen. Ĉe la pordo la furioza edzino renkontas lin kun pato. Malferminte la pordon, edzo ricevas fortan frapon per pato sur sian kapon.

— Jen pro tiu eksplodema temperamento mi amas vin, — diras la edzo kaj svenas en la loĝejon.

Amasigis **Kukucapa Nemoskovskaja**

**“La Ondo” deziras al vi
Agrablan Kongresan Sezonon!**

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Giganto tutgalaksia

Ne forgesu, ke la revuo *Esperanto* estas la oficiala organo de UEA, kiu sin ĵetas en travivadon de granda movada epopeo kaj bezonas plifortigi sian universalan aliancon. (*Kiel aperi en Kalejdoskopio?* // *Esperanto*, 2014, №5, p. 104)

Post mortigo de urso ja vendu ĝian felon

La organizintoj de la Kongreso ofertis variajn ekskursojn. (Dudich Endre. *Kongreso en la lando de la Trikapo monto* // *Nordhungaria Informo*, sep 2007, p. 23)

Post lukto kun tigro, akiru artistfelon

Tute ne estas strange en Kartvelio vidi statuojn de kavaliro luktanta kun tigro por akiri ties felon aŭ de la ilustrinto de unu el la eldonoj [de la poemego *Kavaliro en tigra felo*]... (Renato Corsetti. *Malfacila reviviĝo, kvazaŭ lukto kun tigro* // *Esperanto*, 2014, №5, p. 116)

Pintas afablo en civitcentro

Kreskas la bonvola stabo de KCE (*Heroldo Komunikas* 558 4-B, 23 maj 2014, esperantio.net/index.php?id=2408)

In-testo

Mi... en manoj viaj teneraj / povas mian ventemon lasi. (Oĉjo Ĉajka. *Vento povas* // *Ventemo*. Impeto: Moskvo, 2013, p. 8)

Satige por bizonoj

... la manĝoj daŭris longe ĉar la manĝaĵoj estis bongustaj, ktp. Kiu bizona alian etoson?

(Renato Corsetti. *Verdas Kaŭkazo: 7a Mezorianta Kunveno en Kartvelujo*, sezonoj.ru/2014/04/mok)

Papaga artificio

Rakontante pri sia propra vivo en la artikolo li diras en tute natura maniero 30-foje la vorton Esperanton. (Laŭ László Szilvási, *Horizontaal*, nov-dec 2013, p. 5)

Viculoj en tranco

Blank-rugan runandon komune fortrancis la vicmarsalo de la Podlahia Vojevodio Jacek Piorunek, la vicurbestro de Bjali-stoko Aleksander Sosna... (espero.bialystok.pl/eo/article_376,12,1.html, stato 5 jun. 2014)

Senkonscie, aŭ: Ĥemio funkciis

Béla Lengyel [...] doktoriĝis en Heidelberg kaj li komatiĝis kun Robert Wilhelm Bunsen kaj Hermann von Helmholtz. ([eo.wikipedia.org/wiki/Béla_Lengyel_\(1844\)](http://eo.wikipedia.org/wiki/Béla_Lengyel_(1844)), stato 5 jun. 2014)

Rura opo val-vestita

Lingvovestivalo en Danio. Okaze de la Ruropa Tago de Lingvoj Dana Esperanto-Asocio aranĝis lingvofestivalon... (*Eŭropa Bulteno*, sep 2008, p. 2)

Kultrua pintatingo

Ĉi tie do, la unuan fojon, kuŝas antaŭ ni verko, kies dimensioj kaj arta kontruo metas nete en la familion de la grandaj roman-verkoj. (Kovrilo de *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz, Edistudio, 1991; rimarkis Russ Williams)

Plukis István Ertl



La 30a ARKONES atendas vin!

La 26–28an de septembro okazos en Poznano (Pollando) la arta festivalo ARKONES – 30aj ARTAJ KONfrontoj en ESperanto. Ĉi jare oni festas la 30an okazigon de ARKONES.

Denove la ĉefurbo de Grandpolujo iĝos por unu semajnfino ankaŭ la ĉefurbo de Esperanto-kulturo kaj arto. La ĉefa branĉo de la festivalo estas arta, kaj la du aliaj estas scienca kaj movada. Krome, antaŭ ARKONES okazos en Poznano Interlingvistikaj Studoj kaj Interlingvistika Simpozio, ambaŭ ĉe la Universitato Adam Mickiewicz.

La programo ankoraŭ ekformiĝas laŭ la kutima somerpigra ritmo. Ĝi inkluzivos, interalie (ĝis nun konfirmite), koncertojn de muzikistoj alilandaj (Grupo *Kajto*, Mikaelo Bronstein) kaj Pollandaj (Zuzanna Kornicka, koruso *Bel-Canto*). Sian partoprenon konfirmis ankaŭ nia amiko, esperantista poeto kaj unu el la simboloj de ARKONES — Jarlo Martelmonto.

Okazos pluraj prelegoj kaj prezentaĵoj, plejparte pri la Esperanto-kulturo kaj arto. Aliaj traktos pri lingvistiko kaj nuancoj de la lingvo internacia. Estas klare, ke tio estas nur peco de nia jubilea torto. Ni atendas aliĝojn kaj programproponojn.

Pro la jubileo ĉi-jare ni atendas pli da gastoj. Sian partoprenon konfirmis, krom eŭropanoj, esperantistoj de Japanio kaj Brazilo. Ankaŭ vi, kara leganto de *La Ondo*, ne maltrafu la feston. La festivalo estas vizitinda speciale por kultur-emuloj, sciencemuloj kaj fervoraj movadanoj. La kotizoj estas okulfrape malaltaj (kaj rabateblaj).

Legu pli: <http://www.arkones.org/>

Tobiasz Kaźmierski



Aŭstralio. La 16–17an de majo 2014 okazis la unua lingva festivalo en la Universitato de Adelajdo, kiun organizis profesoro pri lingvistiko kaj endanĝerigitaj lingvoj Ghilad Zuckermann. La publiko povis konatiĝi kun 28 lingvoj, ankaŭ kun Esperanto, kaj aŭskulti prilingvajn prelegojn. (Katja Steele)



Argentino. Du monatojn antaŭ la 99a Universala Kongreso, kiu malfermiĝos la 26an de julio en Bonaero, la ĉefurbo de Argentino akceptis kvin kandidatojn, kiuj je la Tria Tutmonda Ekzamentago (vd. p. 3) testis siajn sciojn de Esperanto laŭ la programo de la Referenckadro. (Katalin Kováts)



Pollando. La 23an de majo en la elementa lernejo №9 en Vroclavo (Silezio) okazis la dua Eŭropa Festivalo de Esperantaj kantoj (vd. p. 7), en kiu partoprenis junaj solistoj kaj ensembloj. Post la anonco de la rezulto la laŭreatoj kaj partoprenintoj fotiĝis kun diplomoj kaj pokaloj. (Małgosia Komarnicka).



JORGE LUIS BORGES
La sekreta miraklo


Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*
 Serio *Mondliteraturo*, Volumo 16
 200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne

Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj

Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*
 Serio *Mondliteraturo*, Volumo 15
 208 paĝoj, 20 eŭroj



Arthur
 Conan
 Doyle

LA AVENTUROJ DE
 ŜERLOKO
 HOLMSO

Serio "Mondliteraturo", №18

A. Conan Doyle. *La aventuroj de Ŝerloko Holms*
 Serio *Mondliteraturo*, Volumo 18
 248 paĝoj, 20 eŭroj



Bernhard
 Schlink

LA LEGISTO

Serio "Mondliteraturo" №19

Bernhard Schlink. *La legisto*
 Serio *Mondliteraturo*, Volumo 19
 120 paĝoj, 12 eŭroj